

1975 aprilo

68-a jaro


n-ro 832 (4)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

NE ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — rotterdam-3002 — nederlando



La 31a IJK:

Fredericia logas junularon

Vi trovos

ke ĉi tiu numero atingas vin du semajnojn pli frue ol okazis kun la marta numero, kvankam ankaŭ tiu ĉi malfruas proksimume du semajnojn. Ne tre multe valoras fari promesojn, ĉar je la noktomezo kiam ni kompostas ĉi tiujn liniojn estas malfacile diveni kian serenecon portas al ni majo. Tamen, bonvolu almenaŭ kredi, ke ni faras ĉion eblan kaj eĉ kelkajn maleblajn klopodojn por denove ĝisdatigi la revuon; kedu, ke la malfruoj ĝenas nin multe pli ol vin mem. Dankon.

Tio, kio aparte kuraĝigas tiel nin profesie ligitajn al la Movado kiel tutcerte ankaŭ ĉiun membron de UEA, estas la subteno, kiun granda nombro da membroj esprimas en plej diversaj manieroj. Bela ekzemplo de tiu solidareco estas ankaŭ la nekutime longa listo de donacintoj (v. la paĝon 79) kaj la nombro de tiuj, kiuj malavare aliĝas al la Societo Zamenhof (en la momento de la finredakto tiu nombro jam estas 74). Espereble, ankaŭ la aliaj novaj ideoj, kiujn ni lanĉas en ĉi tiu numero, renkontos samspecan apogon kaj plenan komprenemon, Eventuale, vi rimarkos, ke ni ankaŭ en ĉi tiu numero sukcesis rezisti al la malnovstilaj defioj, kiujn direktis al nia revuo iuj aliaj movadaj periodaĵoj. Nu, ne temas pri tio, ke ni ne havas kion diri, sed pri la fakto, ke ni nek volas nek trovas tempon okupiĝi pri tiuj bastonoj celantaj haltigi la radon de la neŭtrala internacia Esperanto-movado.

Enhavo

- 61 La Movado serĉas volontulojn: Labori por io vere pozitiva (V. Sadler)
- 62 La estonteco de CED: Trezoro de sciplenaj homoj (resumo de provizora raporto de prof. d-ro Jonathan Pool)
- 64 Lingva burleskaĵo: Multekosta sandviĉo, La franca lingvo kaj la germanoj: Modo kaj timo, Multe da utilaj servoj, Amara sperto
- 65 La franca lingvo kaj la mondo: Proponata malegaleco (P.G. Forster)
- 66 Okaze de la 100-jara datreveno: Hans Christian Andersen en socia perspektivo (Poul Thorsen)
- 68 Kiu organizos la 61an Universalan Kongreson en 1976? La faktoro entuziasmo (sm)
- 70 Recenzoj ("Interesa arkeologio", "Mia vivo", "Ni devas vivi", "Merlo sur menhiro"), Laste aperis . . .
- 72 La 31a Internacia Junulara Kongreso de TEJO: Fredericia kaj IJK
- 74 TEJO-paĝo: Pli ol plia "bela ideo", HEJS, SET 1975, Svisa migrado, Bona informilo
- 75 Kongresa komuniko: Novaĵoj pri la 60a Universala Kongreso
- 76 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 78 Esperanto en radio (kompleta tabelo)
- 79 Oficiala informilo
- 80 Anoncetoj, Anonco

La kovrilo

Tradicie ankaŭ la jara ĉefaranĝo de la junulara sekcio de UEA okazas en la sama lando en kiu okazas la Universala Kongreso. Kvankam ne multnombra organizaĵo, Dana Esperanto-Junularo akceptis la defion kaj invitis la 31an Internacian Junularan Kongreson de TEJO al la dana urbo Fredericia. Laŭ la nuna stato de la preparlaboroj, ŝajnas, ke la Kongreso (okazonta en la semajno antaŭ la UK) promesas esti tre sukcesa aranĝo (v. la paĝojn 72-73). La kovrila bildo montras vidaĵon al la ĉefstrato de Fredericia.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Telefono: (010) 36 15 39.

Telegramadreso: ESPERANTO ROTTERDAM.

Fondita en 1905 de Marcel Paul Berthelot (1881-1910).

Redaktoro: Simo Milojević.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Abonprezo por unu kalendara jaro: 37,50 gld. (kun membreco kaj Jarlibro 50,— gld.) Unuopa ekzemplero 3,— gld. Por jara aerpoŝto aldonu: Oceanio 16,50; Sudameriko 13,75; Suda Afriko, Azio 11,—; Meza kaj Norda Ameriko, Mezoriento, Meza kaj Norda Afriko 8,25 gld.

Anonctarifo: 1p. 375 gld.; 1/2p. 200 gld.; 1/4p. 110 gld.; 1/8p. 65 gld.; 1/16p. 40 gld. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-singel 93, Rotterdam-3002 (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj kaj kulturo: D-ro H.R. Tonkin, 35 Violet Lane, Lansdowne Pa. 19050, Usono; tel. (215) CL9-8821.

Vicprezidanto kaj estrarano pri landa kaj regiona agado: D-ro W. Bormann, Schärstr. 26, D-205 Hamburg 80, FRG; tel. (040) 7384508.

Vicprezidanto kaj estrarano pri faka agado: Prof. d-ro C. Støp-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, Oslo 2, Norvegio; tel. (472) 448085.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri administrado, komerco, industrio kaj diskonigo de la agado de UEA: E.L.M. Wensing, Dennenstr. 9, B-3581 Achel, Belgio; tel. (011) 643150.

Estrarano pri la delegita reto, rilatoj kun Esperanto-organizaĵoj kaj pri specialaj agadoj: D-ro P. Denoël, rue Victor Raskin 20, B-4000 Liège, Belgio; tel. (041) 270079.

Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: D-rino F. Szabó-Felső, Várady A. út. 4, H-7621 Pécs, Hungario.

Estrarano pri informado kaj turismo: S. Świstak, ul. Racławicka 10m 11, PL-30-075 Kraków, Pollando.

Estrarano pri financo: E.J. Woessink, Onder de Beumkes 29, Velp-6200, Nederlando; tel. (08302) 7412.

Labori por io vere pozitiva

UNUJARA VOLONTULA SERVO al la Esperanto-movado kun financa helpo de UEA: tio estas la kerno de bonaŭgura nova plano, kiu celas trejni junajn aktivulojn en profesia kadro kaj pli efike utiligi por la Asocio entuziasmajn laborfortojn kaj talentojn. En sia unua etapo la plano — ellaborita de la Estraro en la lastaj monatoj — antaŭvidas ebligi al kelkaj elektitaj gejunuloj restadi dum maksimume unu jaro en Rotterdam por labori en la Centra Oficejo kaj samtempe spertiĝi en la praktiko pri unu aŭ alia fako de la asocia agado.

La plano estas inspirita de la ekzemplo de pluraj landoj, en kiuj gejunuloj havas la ŝancon (ofte anstataŭ militservo) vivteni sin dum simila periodo je la kostoj de la ŝtato kaj plenumi socie utilan laboron en- aŭ eksterlande: ekzemple en la kadro de helpo al evolu-landoj. Jam ekzistas sukcesa precedenco ankaŭ en la Esperanto-movado: Dana Esperanto-Asocio de kelkaj jaroj disponas pri la kvazaŭ-profesia laboro de milit-rifuzantoj, kiuj, kun financa subteno de la dana ŝtato, dediĉas sin al agado por DEA. En la nova plano de UEA ne temas pri anstataŭaĵo de militservo, sed temas pri klopodo solvi unu el la fundamentaj problemoj de la Movado, nome, ke unuflanke ekzistas granda idealismo kaj preteco sindone labori por la Internacia Lingvo, dum aliflanke oni ne scias kiel labori kaj mankas eblecoj por funde konatiĝi kun organizaj metodoj; kaj ke la Centra Oficejo ege bezonas kapablajn, energiajn kaj sindonajn laborantojn kaj estas bone ekipita por instrui ilin.

Se UEA ĝuus imponajn subvenciojn, estus facile transponti tiun problemon. Ĝi povus al ĉiuj kapablaj interesitoj pagi konvenajn salajrojn, por ke ili vojaĝu al Nederlando kaj tie kontentigadu sian lernemon kaj

la praktikajn laborbezonojn de la Centra Oficejo de UEA.

Kiel konate, tamen, la realo estas iom alia. En la nuntempaj financaj kondiĉoj, necesis eĉ draste malgrandigi la nombron de salajrataj oficistoj. Dum la asociaj organoj disvolvas novan viglan aktivecon sur pluraj frontoj, en la Centra Oficejo la manko de laborfortoj fariĝis kriza. Vere, ĉu ne nun estas la tempo, kiam montriĝos la solidareco, decidemo kaj sindediĉo de ĉiuj, kiuj volas ne nur ĝisatendi la eksplodan tutmondigon de la Internacia Lingvo, sed kiuj volas **aktive** pliproksimigi tiun estontan perspektivon? Ni jam vidis, en la rekorda sumo de mondonacoj al UEA en la lasta duonjaro, kiel ĝiaj membroj reagis al la minaco de financa krizo. Nun ni troviĝas en situacio, en kiu eĉ pli urĝe ni bezonas laboron. Malmultaj povas donaci grandajn monsumojn, precipe inter la junularo; sed ĝuste ĉe la junularo troviĝas la energio kaj laborkapablo, kiujn ni bezonas. Se vi ne povas doni al la Movado monon, ĉu vi ne povas doni ion eĉ pli valoran — vin mem?

Se vi estas juna kaj sana, sen familiaj devoj, eble ĵus finstudinta sed ankoraŭ ne decidiĝinta pri kariero — pensu pri la ideo pasigi unu jaron de via vivo en nova lando, en internacia medio, kie via laboro kaj viaj talentoj estos vere aprezataj kaj kie vi havos tiun — maloftan — kontentigon, ke vi laboras por io vere pozitiva. UEA ne povas proponi al vi salajron, sed ĝi ja povas kontribui al viaj vojaĝkostoj, certigi al vi modestan loĝadon kaj manĝadon plus iom da poŝmono. La laboro en la Centra Oficejo estas ege varia, kaj la ĉiutagaj kontaktoj kun membroj kaj organizaĵoj en ĉiuj kontinentoj signifas gravan riĉigon de la pensmaniero. Tie vi havos eblecon spertiĝi en unu el pluraj interesaj fakoj: en fotografiaj laboroj, en kompostado, en librotenado aŭ librokomerco, en kongresa organizo aŭ administraj metodoj. Kaj, kompreneble, vi uzos ĉiutage preskaŭ ekskluzive nur la Internacian Lingvon, el kio via lingvoscio tutcerte profitos. Se vi havas literaturan aŭ historian inklinon, la Biblioteko Hodler estas je via dispono por kromaj studoj.

Bedaŭrinde, ne por ĉiu ajn volontulo ĉi tiu invito validas. La nederlandaj laborleĝoj estas tiaj, ke tiu studlaboro estas arangebla nur por gejunuloj de 18-ĝis 29-jaraj. Ili rajtas resti en Nederlando maksimume unu jaron. Ankaŭ la lando ludas rolon: la necesa permeso estas relative facile ricevebla por gejunuloj el la landoj de EEK kaj el kelkaj aliaj eŭropaj landoj, el Usono kaj Kanado, kaj nur malpli facile por tiuj, kiuj loĝas en aliaj landoj aŭ kontinentoj. Kompreneble, UEA prefere akceptos tiajn personojn, kiuj deziras spertiĝi en Esperantaj laboroj por posta aktivado en



Rotterdam: La Centra Oficejo troviĝas en dinamisma kaj moderna urbo kun la plej granda haveno en la mondo.

landa aŭ faka asocio aŭ sur alia movada kampo, kaj kies lingva nivelo, instruiteco kaj kapabloj estas tiaj, ke ili plej efike kontribuos al la laboro de la Oficejo. Tiucele, la Estraro de UEA aŭ komisiono nomita de ĝi zorge ekzamenos kaj kribros la sinproponojn. Se vi serioze interesiĝas pri ĉi tiu tute nova speco de agado, anoncu vin unue al la direktoro de la C.O., kiu sendos al vi detalan demandaron.

Ĉi tiu alvoko lanĉas nur la unuan stadion de la projekto. La Estraro antaŭvidas, ke, se ĝi montriĝos sukcesa, ĝi estos poste plivastigita en diversaj formoj sur landa kaj internacia niveloj. La rezulto — se ĉio iros bone — estos kreskanta profesiecigo de la volontula laboro por Esperanto kaj gravega volontula apogo al la laboro farata profesie.

V. Sadler

LA ESTONTECO DE CED:

Trezoro de sciplenaj homoj

Prof. d-ro Jonathan Pool, kiun la Estraro de UEA en aŭgusto pasintjare nomis aganta direktoro de CED, fine de marto ĉi-jare pretigis t.n. provizoran raporton pri la estonteco de CED. Temas, tamen, pri ampleksa teksto (ĉ. 6000 vortoj), kiu klopodas prijuĝi la ĝisnunan aktivecon de ĉi tiu institucio de UEA kaj — ĉefe — doni bazon por serioza diskuto pri ĝiaj estontaj celo kaj funkciado. Ĉar d-ro Pool intencas en junio ellabori definitivan raporton en formo de propono al la kompetentaj organoj de UEA, ni opiniis, ke montriĝos utila ĉi-suba resumo de la provizora raporto, des pli, ke oni pri CED malmulton aŭdis lastatempe kaj, ke ankoraŭ eblas fari sugestojn antaŭ ol d-ro Pool definitivigos sian proponon al la Estraro de UEA.

LA PRITRAKTO de la ĝisnuna laboro de CED komenciĝas per jena aserto: "La Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED) neniam estis tio, kion indikas ĝia nomo nuna, nek tio, kion indikas ĝia malpli pretendema eksnomo, Centro de Esploro kaj Dokumentado (de Universala Esperanto-Asocio). Ĝi ĉiam fakte estis **centro de dokumentado, informado kaj argumentado por la Esperanto-movado**. Kun tri gravaj esceptoj, ĝi ne okupiĝis pri esplorado, nek pri la lingvaj problemoj de la mondo ĝenerale; . . .". Laŭ d-ro Pool, tiuj esceptoj estas: 1) la kolekto de ĵurnalaj eltranĉaĵoj en la CED-arkivo, 2) la projektoj pri *Esperanto en Perspektivo* kaj *Enciklopedio de Esperanto* kaj 3) la scienca revuo *La Monda Lingvo-Problemo*. La raporto plue asertas, ke "mankas atestaĵoj, ke sciencaj institucioj konsideris CED unu el si, aŭ, ke CED ĝuis ekstermovadan prestiĝon aŭ fidon, aŭ, ke tiuj kun lingvaj problemoj konsultis CED por trovi solvojn, aŭ, ke iu traktis *CED-dokumentojn* kiel ion alian ol informilojn de UEA. La sola projekto de CED, kiu sukcesis en la scienca mondo, estis *LMLP*."

La provizora raporto de d-ro Pool vidas kaŭzojn de tia stato ĉefe en la ĝisnuna koncentriĝo de la laborado kaj gvidado de CED ĉirkaŭ la persono de la fondinto de ĉi tiu institucio. Klopodante juĝi la efektivan laboron plenumitan de CED, la raporto notas: "La kvalito de la laboro de CED estis ĝenerale alta, almenaŭ la statistika laboro. CED penis prezenti la faktojn pri la Esperanto-movado per siaj *Dokumentoj*, sen troigoj, malgraŭ tio, ke la objektivaj faktoj estis malfacile kolekteblaj."

La nunaj kaj estontaj bezonoj

D-ro Pool resumas la ĝisnunan strategion de la Movado kiel, unuflanke, klopodon disvastigi la lernadon kaj uzadon de Esperanto kaj pliriĉigi ĝin, kaj, aliflanke, strebadon gajni por sia starpunkto apogon de kiel eble plej multaj instancoj, organizaĵoj kaj unuopuloj.

Nomante tiun strategion "duopa", d-ro Pool okupiĝas pri eblecoj pli sukcese apliki ĝin kaj asertas, ke unu el la ĉefaj malhelpoj tiurilate estas la nivelo de scio kaj kompetento. Li formulas tion en jenaj kvar punktoj:


"1. La tuta mondo devas ekscii multe pli pri la lingva situacio internacia, pri ĝiaj kaŭzoj, pri ĝiaj sekvoj kaj pri la eblecoj de interveno por ŝanĝi la situacion.

2. La mondo devas multe pli bone ekscii la faktojn pri Esperanto.

3. La membroj de la Esperanto-movado devas ekscii ankoraŭ multe pri la sciencaj faktoj, kiuj rekte tuŝas Esperanton.

4. La membroj devas ekscii ankoraŭ multe pri granda aro da aferoj, kiuj helpus al ili plibonigi sian laboron por Esperanto."

La provizora raporto asertas, ke esperantistoj bone konscias pri la unuaj du punktoj, sed, ke oni ne povas tion diri pri la du lastaj, kvankam estas pli ol evidente, ke ĉiuj kvar aferoj devus iri kune. La raporto konstatas, ke esperantistoj "ĝenerale supozas, ke ili mem scias tion, kion oni devas scii pri la lingvoproblemo kaj ĝia solvo; ili konceptas la taskon jene: doni tiun scion al la mondo." Tia sinteno, laŭ d-ro Pool, kondukis al preskaŭ kompleta dispartiĝo inter esperantistoj kaj ekspertoj pri la lingvo-problemo. En la



La dosieraro de CED translokiĝis de Londono al la Centra Oficejo en Rotterdam: Ĉu la nova sidejo de CED signos ankaŭ novan laborstilon de ĉi tiu institucio?

Movado oni ne zorgis kultivi kompetentulojn pri la lingvo-problemo ĝenerale, sed insistis pri unuflanka ekspertiĝo sole en la kampo de Esperanto. Tion d-ro Pool trovas nenormala kaj neadekvata kaj li pledas por ŝanĝoj, kiujn lia raporto larĝe argumentas.

La baza rekomendo de la raporto

”Oni ne renomu CED konforme al ĝia laboro. Oni ja reorganizu CED por fari laboron konforman al ĝia nomo. Esperanto kaj la Esperanto-movado bezonas efektivan centron de esploro kaj dokumentado pri la monda lingvo-problemo. Ankaŭ la mondo bezonas tian centron. Tia centro povas servi samtempe al Esperanto kaj al la homaro.” Tiel pledas la raporto antaŭ ol jene formuli la ĉefajn celojn de CED por la estonteco:

- ”1. Pliigi kaj vastigi la scion pri lingvaj problemoj, kiuj ekzistas ĉe la internacia nivelo.
- 2. Pliigi kaj vastigi la scion pri ĉiuj eventualaj metodoj por solvi tiujn problemojn.
- 3. Pliigi kaj vastigi la scion pri ĉiuj aspektoj de Esperanto.
- 4. Plialtigi la nivelon de eksperteco pri la ĉi-supraj kernaj kampoj ĉe kiel eble plej multaj membroj de la Esperanto-movado.
- 5. Helpi al la organizoj kaj membroj de la Esperanto-movado akiri sciojn en ĉiuj aliaj kampoj rilataj al ilia movada laboro.”

La raporto tiel konceptas la aferojn, ke estonte la ĉefa zorgo de CED devus esti eduko de spertuloj en la sfero de ne nur kernaj sed ankaŭ ĉiuj kampoj rilataj al la lingvo-problemo. El tio devus rezulti situacio en kiu

”la plej granda valorajo de CED ne estus la arkivo de eltranĉaĵoj en la Centra Oficejo, sed trezoro de vivantaj, talentaj, sciplenaj, adaptiĝemaj kaj kunlabor-emaj homoj, disaj tra la mondo sed rapide mobilizeblaj.”

Vojoj de efektivigo

La plej longa ĉapitro en la provizora raporto estas ĝuste tiu, kiu traktas la estontan gvidadon de CED, ĝiajn financojn, rilatojn kun aliaj organizaĵoj kaj unuopuloj, manierojn por atingi ĉiun el la menciitaj kvin celoj de la estonta agado kaj, fine, la sorton de la agadoj, kiujn CED faris ĝis nun. Ĝuste en tiu ĉapitro de la raporto troviĝas tuta aro da novaj ideoj, kiuj plurloke ŝajnas jen tro ambiciaj, jen plene revoluciaj, sed ĉiukaze freŝaj kaj ĝis nun ne traktitaj. Tamen, la raporto amplekse argumentas ĉiun el ili unuope, tiel, ke ne eblas preteriri seriozan diskuton pri ili.

Elstarigante antaŭ ĉio fakajn kompetentulojn, d-ro Pool proponas kompleksan gvidstrukturon de la estonta CED. Krom tio, ke la Estraro de UEA konservas rolon en tiu gvidado, en la propono troviĝas ankaŭ 3-membra estraro de CED kaj — kio ŝajnas esti la ĉefa novaĵo — scienca konsilantaro de la institucio. CED devus ankaŭ estonte kalkuli pri kunlaborantoj — korespondantoj laŭ la raporto —, kiujn nomos la estraro de CED. Planoj por la estonta financado antaŭvidas ne nur regulajn subvenciojn el la buĝeto de UEA, sed ankaŭ ekstermovadan apogon, kiu devus esti akirebla kiam CED komencos okupiĝi pri projektoj de ankaŭ ekstermovada intereso.

Tra la tuta raporto oni insiste ripetas, ke esenca por la estonteco de CED estas la daŭrigo de la eldonado de *LMLP*, kiu eventuale serĉu alian eldonejon kaj estu rabatite abonebla por la membroj de UEA. Krome, oni mencias novajn eldonaĵojn, ekz. ”Studoj de CED” kaj ”ĉiujara faktolibro pri la monda lingvo-problemo”. Oni en la raporto asertas, ke ”la esperantologio lastatempe preskaŭ ekziliĝis” el la Movado kaj oni pledas pri reaperigo de *Esperantologio* ”en malpli luksega formato”. La raporto proponas, ke la eldonaĵojn similajn al la ĝisnunaj *CED-dokumentoj* transprenu rekte UEA, des pli, ke plej ofte temas pri la agado de UEA mem. En la fino de la raporto troviĝas listo de ”kelkaj fakoj” pri kiuj UEA kaj CED bezonas ekspertojn; tiu listo konsistas el 62 fakoj!

NOTO DE LA REDAKTORO: La celo de ĉi tiu resumo ne estis diskutigi jam nun la tutan problemaron de CED en nia revuo, sed nur supraĵe informi pri la enhavo de la resumita provizora raporto. Se oni havas komentojn, novajn proponojn kaj sugestojn — kaj aparte, se oni pli serioze interesiĝas pri la estonteco de CED kaj volas havi la plenan tekston de la raporto — oni bv. peti ekzempleron rekte de la aganta direktoro de CED: Prof. d-ro Jonathan Pool, Department of Psychology, McGill University, P.O.Box 6070, Station ”A”, Montréal, Québec H3C 3G1, Kanado.

Multekosta sandviĉo

LA MONATA MAGAZINO *Reader's Digest*, kies plurlingvaj eldonoj atingas la eldonkvanton de preskaŭ 30 milionoj da ekzempleroj, antaŭ kelka tempo aperigis jenan kuriozaĵon:

Italo, vizitanta Kanadon, prenis ĉambron en la plej moderna hotelo de Winnipeg. La ĉambro, plenplena je diversaj butonoj, ŝaltiloj kaj aliaj teknikaĵoj, tentis la gaston elprovi kiel funkcias diversaj servoj en la hotelo. Li elektis la telefonnumeron de la akceptejo kaj petis, ke oni en lian ĉambron portu sandviĉon. La oficisto en la akceptejo, kompreninte eĉ ne unu vorton el tio kion la gasto diris, kredis, ke plej prudente estas konekti lin kun la telefoncentralo en Winnipeg. La oficisto de la telefoncentralo, kompreninte same tiel nenion el tio, kion al li parolis la italo, sed aŭdinte plurfoje la vorton "Italio", opiniis, ke la hotelgasto deziras telefoni al Italio kaj tuj konektis lin kun Montrealo. Sed, ankaŭ la oficisto de la montreala telefoncentralo tute ne parolis la italan. Tamen, surbaze de tio kion li aŭdis de la telefonisto en Winnipeg, li konektis la turiston kun Romo.

Kiam finfine la telefonisto el Romo demandis la italan turiston kion li volas, la hotelgasto, ne komprenante kio intertempe okazis, tute trankvile diris:

"Mi ja jam trifoje diris: mi deziras sandviĉon kun kapsikoj kaj laktuko kaj unu bieron!"

LA FRANCA LINGVO KAJ LA GERMANOJ:

Modo kaj timo

LA PERIODAĴO *Pariser Kurier*, kiu aperas en la franca kaj germana en Parizo, plendas, ke ne sufiĉas nur proklami franc-germanan kunlaboron, sed necesas, ke ankaŭ la institucioj de la du landoj faru klopodojn por realigi tiun proklamon.

Ĉio franca estas kvazaŭ modo en Germanio: la germanoj manĝas francajn fromaĝojn, drinkas francan konjakon, veturigas francajn aŭtomobilojn kaj dormas en francaj litoj. Sed, kiam la kanceliero Schmidt kaj la prezidanto Giscard d'Estaing telefonas unu al la alia kaj interparolas pri la t.n. eŭropaj problemoj, — ili konversacias en la angla. Laŭ *Pariser Kurier*, oni eĉ ne povas atendi ion alian, se oni konas la staton de la instruado de la franca lingvo en la Federacia Respubliko Germanio. En pluraj federaciaj ŝtatoj de FRG leĝe necesas minimumo de 22 lernantoj por formi klason por la lernado de la franca, dum en aliaj

ŝtatoj la franca tute ne troviĝas en la lernejoj programoj, tiel, ke nur 2% de la lernantoj elektas la francan kiel "la unuan fremdan lingvon" kaj 37% kiel "la duan". Kvankam Francio lastatempe entreprenis iaspecan kulturan ofensivon ĉi-riate — malfermante francajn lernejojn en Germanio kaj sendante grandan nombron da instruistoj trans Rejnnon — tre magraj rezultoj estis notitaj. Ankaŭ la estonteco ne estas promesdona, ĉar ekde la lerneja jaro 1976/77, nova reformo en la sfero de la edukado en FRG antaŭvidas kompletan forigon de la dua fremda lingvo el la programo por la lastaj du jaroj de la mezlernejoj.

Multe da utilaj servoj

LAŬ ENKETOJ, kiujn oni fine de la pasinta jaro faris inter la delegitoj kaj fakdelegitoj de UEA en FR Germanio kaj Francio, la servoj de la delegitoj estas ankoraŭ tre vaste uzataj.

Dum la jaro 1974, la germanaj delegitoj respondis 881 leterojn kun demandoj, akceptis 514 eksterlandajn gastojn el 55 landoj, faris 43 prelegojn, aranĝis 11 ekspoziciojn, organizis 17 Esperanto-kursojn, peris la akiron de gravaj medikamentoj, kunorganizis kongresojn kaj renkontiĝojn, disponigis sian tradukhelpon kaj faris plurajn aliajn utilajn servojn. La supraj nombroj estas des pli impresaj, se oni scias, ke al la demandoj de la enketo respondis nur ĉ. 65% de la delegitaro.

La enketo en Francio okazis ĝuste en la periodo kiam la francaj poŝtistoj strikis. Tamen, el la alvenintaj respondoj oni konstatas, ke la delegitoj en tiu lando pasintjare akceptis 304 eksterlandajn gastojn kaj respondis 148 demandojn pri tre diversaj temoj. Estas interese, ke la fakdelegito pri turismo en Nice, en sia hotelo "Miron" akceptis 50 eksterlandajn esperantistojn, kion verŝajne influis ankaŭ la daŭra reklamado en la Jarlibro.

Amara sperto

NIA ABONANTO, d-ro Sidki Hamdi el Kuvajto, sendis al ni tradukon de ĉi tiu teksto, aperinta en *Al-Siyassa*, la plej granda ĵurnalo de Kuvajto:

"Alveninte en Parizon, mi tuj spertis lingvajn malfacilaĵojn, ĉar mi ne bone parolas la francan. . . Ho, mi vere bedaŭris, ke mi ne pli diligente studis la francan en la Universitato de Kuvajto. . . Tiutempe mi kredis, ke la angla, kiun mi studis multjare, sufiĉos al mi. Ĝi ja estas tutmonde parolata. Sed tamen, atendis min elreviĝo en Parizo, kie la angla ne helpis. Mi sentis min tute izolita en la urbo de la libereco. . .".

La aŭtoro de la teksto estas kuvajta ĵurnalisto, kiu ofice devis pasigi kelkan tempon en la franca ĉefurbo.

Proponata malegaleco

La pozicioj, kiujn ĝuas grandaj naciaj lingvoj en la sfero de la internaciaj rilatoj, ne ŝuldiĝas sole al tradiciaj faktoroj kaj tiuj de la ekonomia-politika potenco de la landoj kies lingvoj tio estas, sed en la firmigo de tiuj pozicioj gravan rolon ludas ankaŭ la klopodoj kaj kapabloj modernigi la strategion de tiuj lingvoj kaj senĉese adaptadi ĝin al la postuloj de la aktuala politika momento. (Eble nur la pledantoj por la Internacia Lingvo insistas ankoraŭ pri strategio, kiu konvenis al la komenco de ĉi tiu jarcento). La prelego, kiun ni resumas ĉi-sube, pruvas — senrigarde al la akceptebleco de ĝiaj tezoj —, ke la grandaj naciaj lingvoj ne intencas cedi siajn poziciojn, sed serioze meditas kiel plifirmigi ilin.

LA NUNA OFICIALA STARPUNKTO pri la franca lingvo en la mondo — ni celas la starpunkton de la franca registaro — klariĝis dum prelego de la ĉefministro Jacques Chirac al la Internacia Unuiĝo de Francilingvaj Ĵurnalistoj kaj Gazetaro (*Le Monde*, la 9a kaj 10a de februaro 1975). En tiu prelego la ĉefministro, interalie, celis respondi al kritikoj rilate la superregon de la franca lingvo, kiujn faris tiel lingvaj minoritataj grupoj en Francio kiel ankaŭ anoj de france parolantaj ŝtatoj en la Tria Mondo. Li argumentas, ke temas ne pri superrego, sed pri solidariĝo. Laŭ s-ro Chirac, en la nuna momento la parolado de la franca lingvo estas la plej facila kaj la plej certa rimedo por solidariĝo inter diversaj landoj. La ĉefministro asertas, ke la lingvo helpas ankaŭ rilate la proksimiĝon al la tekniko, pensado kaj kreaĵoj de la industriaj landoj fare de multaj aziaj kaj afrikaj ŝtatoj. Por francoj, ilia lingvo estas la rimedo de konatiĝo kun deziroj de la landoj en la Tria Mondo. S-ro Chirac refoje insistas, ke ankaŭ ĉi tie ne temas pri deziro superregi, des pli, ke li trovas la timon pri malintegriĝo de la tradiciaj kulturoj senbaza, kion klare jam pruvis la historio de la du lastaj jarcentoj. La prelego atentigis pri stranga renversiĝo en la starpunktoj de la dekstruloj kaj maldekstruloj rilate la francan lingvon: Antaŭe, je la fino de la 19a jarcento, la konservativuloj — monarkistoj kaj religiuloj — apogis la batalon por la rajtoj de la lingvaj minoritatoj en Francio, dum la maldekstruloj tiamaj subtenis la normigon de la instruado de la franca lingvo. Sed, en la nuna tempo, kelkaj konservativuloj opinias, ke konsideroj de la minoritataj lingvoj endanĝerigas la unuecon de la franca ŝtato; samtempe, la ekstrema maldekstrularo penas revivigi la kulturon de la pasinteco. Klarigante sian starpunkton tiurilate, la ĉefministro esprimis sian apogon al la konservado de la regionaj kulturoj. Tiu regiona diverseco povas nur fortigi la nacion. Li atentigis, ke tiuj, kiuj prezentas la francan lingvon kaj la francan vivmanieron al la ekstera mondo nepre devas emfazadi modernaĵojn. Reciproke, tio signifas, ke la francoj devos esti pretaj en la estonteco aŭskulti la eksteran mondon en la diversaj lingvoj, kiujn ĝi parolas. La ĉefministro

esprimis bedaŭron pro la koncentriĝo en la instruado nur je la angla lingvo, kiun oni tamen malbone ellernas. Estas aliaj gravaj mondaj lingvoj, konfesis s-ro Chirac, ekzemple la germana, kiun li trovas grava en la komerco, la hispana kaj la portugala, kiuj estas gravaj sudamerikaj lingvoj, la araba kun historia kaj ekonomia gravecoj. S-ro Chirac konfesis, ke eĉ la angla ne estas fidinda kiam oni komercas kun japano, ĉino aŭ iranano. Se la francoj esprimos pretecon lerni la lingvojn de tiuj landoj, ĉu oni reciproke povos atendi pli volontan lernadon de la franca en eksterlando?

En la fino de sia prelego, la franca ĉefministro unuflanke konfesis, ke li malakceptas la ideojn pri la t.n. universaleco de la franca lingvo, sed li aliflanke diris, ke li atendas, tamen, ke oni defendos tiun lingvon kiel unu el la lingvoj de la civilizo. Laŭ s-ro Chirac, tiu defendado de la franca ne estas la devo nur de Francio, sed de ĉiuj uzantoj de la franca.

Estas evidente, ke la ĉefministro akceptas pli "liberalan", pluralisman koncepton pri la rolo de la franca lingvo, ol oni kutimis fari en la pasinteco: Ekzistas diversaj lingvoj de la civilizo kaj unu el ili estas la franca. Tiurilate li apogas la diversigon de la instruado de fremdaj lingvoj en Francio. Tamen, kiel indikas la redakcio de *Le Monde*, praktika ekzemplo de tia starpunkto pri la lingvo-instruado devus veni de la registaro, kio nun ne okazas, ĉar la angla ĝuas monopolon kiel la unua fremda lingvo en la francaj lernejoj. Interese, kvankam ne surprize, ke s-ro Chirac parolas pri la divido je la lingvoj de la civilizo kaj tiuj aliaj. Menciante la lingvajn minoritatojn en Francio kaj la lingvojn de la Tria Mondo, estas klare, ke li konsideras ilin kiel konservindajn antikvaĵojn aŭ kiel historiajn monumentojn. Li certe atendas, ke la francoj eble eklernos la germanan kaj la hispanan, sed ĉu li vere atendas, ke francoj komencu lerni ankaŭ ekzemple la okcitanan aŭ afrikajn indiĝenajn lingvojn? Ĉar s-ro Chirac konsideras la problemon laŭ starpunkto de soci-evolua teorio, kiu pli alte taksas la kulturon de la potencaj ŝtatoj, lia respondo al la kritikoj ne estis trafa: La interŝanĝo proponata por la franca lingvo — estas interŝanĝo malegala.

P.G.F.

Hans Christian Andersen en socia perspektivo

Eĉ se Hamleto efektive estis dana princo, lia mondfamo neniel atingas tiun de Hans Christian Andersen kun kies verkoj ni ĉiuj konatiĝas plej ofte antaŭ ol ni sukcesas percepti la arkaikaĵon nomatan landlimoj, antaŭ ol ni sukcesas konsciiĝi pri la ekzisto de lia Danlando. Ĝuante tian mondfamon, ne mirinde, ke la centjara datreveno depost la morto de la genia verkisto – dum ĉi tiu jaro – fariĝas atentindaĵo de la tuta mondo. Ĉar Andersen apartenis al tiu nemultnombra elito, kies verkojn tradukis en la Internacian Lingvon en ĝiaj unuaj jaroj Zamenhof mem, ni petis s-ron Poul Thorsen, la unuan plumon de la dana beletro en Esperanto, helpi, ke ankaŭ nia revuo marku la datrevenon. Li sendis al ni la ĉi-sube aperantan tekston, kiu, escepte de kelkaj modifoj, unue aperis en "Norda Prismo" en la jaro 1955.

TRA LA LITERATURO de ĉiu popolo zigzagas fendego inter la popola kaj la akademia mondoj. Sentema leganto tuj rimarkas al kiu mondo apartenas verkisto, kaj en sentema verkisto ofte ekestas grava konflikto pro la medio. Tiel ankaŭ por Hans Christian Andersen.

Kiel 14-jara malriĉulo li venis al Kopenhago, sola, sen familio aŭ konatoj tie. Sed spite al la malhela perspektivo, en tiu dato (la 6a de septembro 1819) ekĝermis lia famo, kaj poste li ĉiam festis ĝin kvazaŭ

ESPERANTO EN PERSPEKTIVO BONEGE VENDIĜAS!

KVANKAM la grandioza verko de CED normale estas mendebla nur depost la komenco de ĉi tiu jaro (en decembro estis liveritaj de la bindejo nur 110 unuaj ekzempleroj), en nuraj tri monatoj la Libroservo de UEA sukcesis vendi pli ol 500 ekzemplerojn nekalkulante kelkdekon da senpagaj disdonoj.

KOREKTO

EN LA ARTIKOLO pri la financo de UEA, "La problemoj kaj kiamaniere venki ĝin", aperinta en la marta numero de nia revuo, okazis bedaŭrinda teknika eraro pro misgluo de korektenda linio. Temas pri la unuaj linioj post la du subtitoloj sur la paĝo 44. Post la subtitolo "Malprofito", la unua linio devus teksti: "Per la grafikaĵo 3 oni povas kompari la proporcion de", dum la unua linio post la subtitolo "Nuna financa situacio" devus teksti: "Por prilumigi la nunan financon de UEA, ni". Ni petas afablan pardonon de niaj legantoj.

naskiĝtagon. Li avidis famon – ne nur pro ia vanto, sed ĉar li sentis, ke famo estas la sola elirvojo de povra vivstato.

Kiel en fabelo liaj revoj efektiviĝis en kaj la intelekta kaj la laika mondoj. Li fariĝis bonhava, monduma vojaĝanto, ŝtata konsilisto kaj honora civitano de la hejmurbo Odense. Sed la socia fendego ekzistadis, kaj transiro ne povis nek povas okazi sen ia formo de pago. Poeto el la plej malalta popoltavolo, tiam same kiel nun, povis grimpi la socian ŝtuparon nur adaptante sin al burĝaj normoj kaj kondiĉoj, t.e. pli malpli neante sian pli fruan medion.

En kelkaj leteroj de Andersen oni vidas vualitan reflektan de burĝaj vidpunktoj ĉe liaj mecenatoj kaj nobelaj protektantoj. Foje li rekte frontas la postulojn de laboruloj. Ekz. en letero kun respondo rilate la tre seriozan masonistan strikon en 1872:

"Mi malĝojas, ke tiaj movadoj povis ekesti en la tiom trankvila kaj tute bonkora dana popolo."

Verŝajne pro samaj motivoj, nur kun 28-jara malfruiĝo aperis lia akra kontraŭ-absolutisma fabelo *La malbona suvereno*, t.e. post la ĉeso de la dana absolutismo. . .

La satiristo M.A. Goldschmidt, estiminda kaj klarvida ĉefo de la tiutempa intelekta rezisto kontraŭ absolutismo, hipokrito kaj burokrateco, skribis amaran recenzon (pri *Bazaro de poeto*) en sia timita revuo *La Korsaro*, 1842:

"De H.C. Andersen, kiu venis el la popolo, kiu mem batalis pezan lukton el mizero kontraŭ riĉo, kiu rigardis en la okulojn de subpremo, ni atendis kun-senton al la popolo, al ĝia mizero kaj subpremiĝo. Almenaŭ kelkajn tremajn ekprenojn sur tiuj kordoj ni atendis de tiu popole naskita poeto, kiu tramigris Germanion, Italion kaj la subjugigitan Orienton. . . Sed H.C. Andersen nur priskribis la brilon de la suno kaj maro aŭ la pompon de l' ebenoj. Efektive! Al mortaj ŝtonoj li donis vivon. Sed al li la vivo de l' popoloj nur restas morta ŝtono."

Kaj tamen la fabeloj de Andersen estas konataj en la tuta mondo kaj ŝatataj eĉ precipe inter malriĉuloj. La supra juĝo sekve povas esti nur supraĵe vera kaj eĉ iomete maljusta. Se Andersen, kiel deziris Goldschmidt, perdiĝus en hejmaj kvereloj, li kredeble delonge estus forgesita. Sed lia perspektivo estis multe pli larĝa ol tiu de liaj kritikistoj. Genie li konsciis, ke ĝuste **la fabelo** estas klasika esprimilo de ĉiuj popoloj tra ĉiuj epokoj. Do, en la fabeloj Andersen tute donis sin mem, parolante senkompare, samtempe al infanoj kaj plenkreskuloj, al naivo kaj erudicio. Kia kontrasto inter li kaj liaj recenzistoj post la apero de la unuaj fabeloj en la jaro 1835:

Ili prude riproĉis, ke princino kisas soldaton (*Fajrilo*), ke bienulino regalas instruiston, kiam la edzo forestas (*Malgranda Niko kaj Granda Niko*), ke *Reĝidino sur pizo* false kredigas al infanoj, ke tia alt-rangulino ĉiam estas tiel terure delikathaŭta ktp.

Sed Andersen neniam cedis al sofistoj. La fabeloj estis **lia** formo. Nur ili liberigis en li la plej delikatajn kvalitojn: humuro, gajo, sprito, ironio kaj satiro. Vidu la fabelojn *La novaj vestoj de la reĝo* kaj *Estas tute certe*.

En *Konkurso de saltado* Andersen montras eĉ ribelemon al sia dua medio. Tiu fabelo en ĉarma formo liveras penetran sarkasmon pri nepotismo kaj snobemo antaŭ ordenoj ("silentigiloj"!).

Ombro estas skurĝado al epigonoj (imitantoj de arto kaj scienco), kiuj parazite alproprigas al si tion, kion pene, dolore kreis originalaj artistoj, kaj kiuj redonas ĉion en groteska, pseŭda formo. Jen multe pli akra karikaturado ol kapablis prezenti la ĉefkarikaturisto Goldschmidt mem! — Tiel freŝe ĉio staras en tiuj du fabeloj, ke eĉ hodiaŭ oni facile povas enmeti aktualajn nomojn kaj eventojn.

Rekta, realisma, senkompromisa batalo fronte al sociaj misaĵoj estis kontraŭ la tuta volo kaj delikata naturo de Hans Christian Andersen. Tamen li atingis per siaj bizaraj fabel-figuroj plenan efikon. Sendube ĉiu plenkreska infano, kiu memoras fabelojn kiel *Ŝi estis tute sentaŭga*, *La najtingalo*, *La malbela anasido* aŭ *Knabineto kun alumetoj* havas vivan impreson, ke Andersen spite al nepra akirita burĝeco konservis en konsiderinda parto de sia verkaro mirigan perspektivon de malsupre, t.e. perspektivo socia rilate al lia amata, povra popolo.

Poul Thorsen

Hans Christian Andersen (statuo en Kopenhago):
La granda verkisto bone konsciis pri la batala forto de siaj verkoj. Kvankam li unuavide ne miksiĝis en sociajn problemojn de siaj lando kaj tempo, liaj verkoj poste komencis "miksiĝi" kaj ankoraŭ "miksiĝas" en la formadon de la pensmaniero kaj karaktero de ĉiu unuopa el inter ni, kaj ne ekzistas indicoj, ke tio baldaŭ ĉesos.



La faktoro entuziasmo

VERŜAJNE oni malfacile povus memori alian landon, kiu tiel persiste ripetadis sian inviton al Universala Kongreso, kiel tion faris Greklando, aŭ pli ĝuste — ĝia ĉefurbo Ateno. La unua invito aŭdiĝis jam en Budapeŝto en la jaro 1966 kaj ĝi estis senĉese ripetata dum la tuta intertempe pasinta jardeko. Nu, la persisto de la grekoj nun jam donis rezulton kaj la Estraro de UEA en sia januara kunsido definitivigis la okazigon de la venontjara UK en Ateno. Eble nun necesas ankaŭ publike konfesi kio tiel longe prokrastigis la akcepton de la greka invito. Esence temis nur pri iaspeca timo, ĉu la relative malforta Movado en Greklando povus sukcese organizi tiel grandan internacian eventon. Estas iom frue jam nun aserti, ke tiu timo havis superfluan grandecon, des pli se tiu aserto bumerange povus reveni al la asertanto en aŭgusto venontjare. Tamen, mi volonte notas ĉi tie tiun aserton.


Preskaŭ nekredebla grado de entuziasmo pri la invito de la Universala Kongreso estis la ĉefa impresio, kiun mi notis dum vizito al Ateno fine de decembro pasintjare. Kiam tiu entuziasmo koliziis kun miaj — tiutempe necesaj — frazpartoj kiel "se la Estraro decidus. . .", "eventuala okazigo de la Kongreso ĉi tie. . .", miaj kunparolantoj kutimis ekboli ĝis kverelo, kvazaŭ ili estus batalantaj por plenumiĝo de sia ĉefa vivrevo. Ĉiun mian dubon pri realaj eblecoj, la grekoj kontestis korse per dekoj da faktoj kaj asertoj. Kiam mi fine starigis denove singarde formulitan demandon: "Se la Kongreso okazus ĉi tie, el kiuj personoj konsistus LKK?", oni tuj diktis al mi 36 nomojn, kio ja sufiĉus por formi almenaŭ tri LKK-ojn. Similan entuziasmon mi renkontis ankaŭ ĉe oficialuloj en la Ministerio de Civilizo kaj la Nacia Turisma Oficejo.

Mi rememoris mian unuan viziton al Greklando en 1962 kaj kontaktojn kun esperantistoj en Saloniko (v. nian revuon, julio/aŭgusto 1962, p.126). Ankaŭ tie kaj tiam mi spertis la saman gradon de entuziasmo. Estas malfacile deĉifri kie originas tiu arda rilato al la Movado. Eble pri ĝi "kulpas" trajto de la greka nacia karaktero. Eble gravan rolon ludas la lingvaj izoleco kaj unikeco de Greklando, kiuj siavice plivalorigas eblecojn de senpera internacia kontaktado proponata de Esperanto. Ĉiukaze, mi nun firme kredas, ke tiu faktoro entuziasmo devis ankaŭ antaŭe havi pli da pezo dum la decidado kie kongresi. Cetere, fondita antaŭ duona jarcento (en 1926), Helena Esperanto-Asocio sian eventualan nunan feblecon parte devus ŝuldi ankaŭ al la fakto, ke en tiu lando neniam okazis grava internacia evento de la Movado. La historio jam delonge pruvis, ke la Universalaj Kongresoj estas bona stimulilo de la enlanda aktiveco por la Internacia Lingvo.

Helena Esperanto-Asocio nun havas ĉ. 400 membrojn, kiuj pagas monatan kotizon de 10 draĥmoj (iom malpli ol 1 guldeno). En la centro de Ateno HEA havas imponan 5-ĉambran sidejon kun telefono kaj dommastrino, kio kostas ĉ. 3 500 draĥmojn monate. La Asocio ne ricevas regulan financon subtenon de la ŝtato, sed iel sukcesas mem kovri siajn regulajn elspezojn, organizante ekskursojn, balojn kaj similajn aranĝojn. Momente en Ateno funkcias 10 Esperanto-kursoj kun ĉ. 60 kursanoj, el kiuj almenaŭ duono sekvas lecionojn por progresintoj. HEA ĝuas bonan renomon ĉe la aŭtoritatoj, kio certe ludos gravan rolon rilate la oficialan apogon al la venontjara UK.



Atenaj aktivuloj (de maldekstre): Sino R. Manus, prezidanto de HEA; s-ro G. Miggas, ĝen. sekretario de HEA, kun d-ro S. Dimopulos; s-ro S. Kusurakis, vicprezidanto de HEA, kaj sino M. Pondika, unu el la plej viglaj aktivuloj de la Asocio.



La majestaj Akropolo kaj antikva teatro en 1976 bonvenigos la portantojn de la moderna homa kulturo, tiu de Esperanto

Alia grava impresio kunportita el Ateno estas, ke Helena Esperanto-Asocio havas sian "leoninon", kiu nomiĝas s-ino Roksan Manusu. Ŝi estas filino de la plej elstara figuro en la historio de la greka Esperanto-movado, d-ro Anakreon Stamatiadis (1867-1965), kaj ŝi jam dum multaj jaroj prezidas la grekan Asocion. Dum mallonga restado tie, mi ne sukcesis malkovri kion signifas la nomo Manusu, sed, ke ĝi ion signifas — tion mi spertis ĉiupaŝe en Ateno. Eĉ kiam mi kun s-roj Kusurakis (emerita vicadmiralo kaj nun vicprezidanto de HEA) kaj Miggas (ĝenerala sekretario de HEA) kaj s-inoj Patsu kaj Pondika iris al ŝtataj funkciuloj, montriĝis, ke la plej bona rekomendo

estis diri, ke ni venas de s-ino Manusu. Foje, enirante elitan restoracion, tuj kiam ni aperis ĉe la pordo, venis la estro kaj la tuta muzikgrupo (regule aperanta en la greka televido) por saluti s-inon Manusu. Poste al nia tablo venis kelkaj sinjoroj por fari la samon, kaj mi sukcesis ekscii, ke inter ili troviĝis ankaŭ deputito de la greka Parlamento.

Sed, en Ateno oni kun bedaŭro konstatas ankaŭ alian aferon, sufiĉe oftan en la Movado: Krom la Helena Esperanto-Asocio tie funkcias ankaŭ Supera Helena Esperanto-Instituto, kies prezidanto estas s-ro Sokrates Sakelaropulos, post d-ro Stamatiadis verŝajne la plej valora kontribuinto al la greka Movado. Sekve de — almenaŭ por ekstera observanto — bagatela miskompreno, la Asocio kaj la Instituto estas en malbonaj rilatoj kaj tute ne kunlaboras. S-ro Sakelaropulos estis afabla renkontiĝi kun mi kaj post duhora konversacio ŝajnis, almenaŭ al mi, ke la miskomprenoj inter li kaj la Asocio estas supereblaj. Estas grave, ke ĉiuj konscias, ke la Universala Kongreso en Ateno estas afero de ĉiuj grekaj esperantistoj, senrigarde al iliaj lokaj apartenoj kaj eventualaj problemoj. Tio ĉi aparte rilatas ankaŭ al la Movado en Saloniko, kie la aktiveco de Salonika Esperanto-Ligo jam dum jaroj ŝajnas esti la plej verva en la tuta lando. Tre verŝajne, en 1976 Saloniko gastigos la 32an Internacian Junularan Kongreson de TEJO.

Oni do povas sen timo iri al Ateno en 1976. Necesas iri tien por sperti la entuziasmon de la lokaj aktivuloj, por kunfesti la 50-jaran jubileon de Helena Esperanto-Asocio. Valoras iri tien por per sia ĉeesto subteni la Movadon sur tiu antikva grundo, kiu povus montriĝi tre fekunda por la Internacia Lingvo. sm



Oni entuziasme lernas en Ateno: S-ro S. Sarafian, la plej aktiva instruanto, kaj tri novaj kursfinintoj kun diplomoj.

Por scivolemulo

Recenzas Bernard Golden (Hungario):

Interesa arkeologio, de M. Ĝivoje. Parizo: SAT, 1973. 60p. Ilus. 17cm. Broŝ.

Ĉi tiu libreto estas popularscienca priskribo de kelkaj aspektoj de eŭropa kaj proksim-orienta arkeologio. La aŭtoro kondukas la leganton subteren kaj subakven por malkovri mikspoton de antikvaĵoj datiĝantaj de la tempo de la biblia inundego ĝis la epoko de la vikingoj. Kvankam originale verkita en Esperanto, la libro ne estas originalaĵo. Granda parto de la enhavo de la dek diverstemaj ĉapitroj estas ĉerpita el jam publikigitaj verkoj. Kelkloke mi havas la impreson, ke Ĝivoje tutsimple tradukis esperantlingven. Lia vidpunkto pri arkeologio estas iom mallarĝa kaj malnovmoda. Ekzemple, li asertas, ke la intereso de arkeologio ĉesas ĉe la periodo de feŭdismo. Nu, ekzistas historia arkeologio kaj industria arkeologio, kiuj utiligas arkeologiajn teknikojn por rekonstrui dokument-mankan kulturhistorion de la 16a ĝis la 19a jarcento. Kvankam la aŭtoro klarigas, ke arkeologiaj restaĵoj ofte troviĝas tute hazarde, la nuntempa arkeologio ne estas kontenta atendi tiajn malkovrojn. Vane mi serĉis mencion pri esplorteknikoj uzataj hodiaŭ por trovi arkeologiajn restaĵ-lokojn (peraviadila fotografado, prospektorado per geofizikaj aparatoj, kemia analizo de grundoj, ktp). Mankas ankaŭ informoj pri unu el la plej interesaj branĉoj de la scienco, eksperimenta arkeologio, kiu evoluis nur lastatempe. Male, enestas en la libro tro da emfazo je la sensacia flanko de arkeologio.

Alia konsterna trajto de ĉi tiu libro estas la malalta nivelo de la lingvo, malgraŭ tio, ke la verko estis "tre skrupule" lingve kontrolita fare de W.F. Kruit kaj la Literatura Komitato de SAT. Ŝajnas, ke iu dormetis dum la reviziado. Krom preseraroj, makulas la tekston tuta aro da lingvaj misoj: kaprica interpunkcio, nekonsekvenca uzo de la artikolo, pekoj kontraŭ la akuzativo kaj malĝustaj vortoformoj. Krome, la stilo estas malglata. Pro manko de spaco, mi ne povas listigi ĉiujn erarojn, kiujn mi trovis, sed jen manpleno da specimenoj:

fotografoj (p.10) = fotografistoj, *Babilonoj* (p.14) = Babilonanoj aŭ Babilonianoj, *elmergiĝis* (p.13) = malmergiĝis, *kolonoj* (p.21) = kolumnoj, *fandita gipso* (p.28) = verŝita gipso, *palisado* (p.39) = palisaro, *klingoj de sagoj* (p.50) = pintoj de sagoj. La aŭtoro uzas arkaikajn formojn kiel *koncentra* (p.39) kaj *miljaro* (p.25) anstataŭ la preferindaj samcentra kaj jarmilo. Netransitivaj verboj kiel *sedimenti* (p.15) kaj *datumi* (p.54) transitiviĝas en la teksto. Sur la paĝo 59 estas listo de vortoj netroveblaj en PIV. Mi aldonas ankaŭ la sekvajn: *draperio* (p.47) kaj *olmo* (p.49).

Originalaj formoj de gentaj kaj geografiaj nomoj estas *haldeja* (p.21) = ĥaldea, *Dofinejo* (p.21) = Daŭfenejo, *Nova Fundlando* (p.35) = Nova Tero.

Antaŭ ol *Interesa arkeologio* povas viciĝi inter la valoraj fakaj kontribuadoj al la scienca literaturo en Esperanto, ĝi bezonas drastan reverkado, sed kiel vulgariga verko ĝi povas havi intereson por iu, kiu scivolas pri arkeologio.

Mendu ĉe UEA: 6,- (por Nederlando 6,24) gld. plus sendokostoj 10%.

Aŭtobiografie

Recenzas Ulrich Lins (FR Germanio):

Mia vivo, de N. Bartelmes. Laroque Timbaut: La Juna Penso, 1975. 58p. 21cm. Multobligita.

Bartelmes, naskita en 1897 en pentrista familio, dediĉas sin de pli ol 50 jaroj al la laboro por Sennacieca Asocio Tutmonda — tiu organizaĵo, kies voko "For la neŭtralismon!" iam teruris la burĝajn esperantistojn. Tiuj ĉi rememoroj agrable surprizas: Bartelmes evitas liveri predikon de pioniro aŭ nin superŝuti per detaloj pri la organiza historio de SAT, sed tute senafekte rakontas epizodojn el sia junaĝo kaj la militaj tempoj, priskribas sian ŝatatan petoladon kun infanoj, konfesas la timemon paroladi antaŭ kongresoj kaj preferon verki artikolojn pri SAT. Kelkaj tiaj artikoloj, verkitaj inter 1934 kaj 1969, formas pli ol duonon de la broŝuro. Ili multilate konfirmas, kion Bartelmes diris pri si mem: "... neniam mi povis liberigi min el romantikemo". Konforme al la principo de SAT, Bartelmes insistas, ke Esperanto estas nur ilo por atingi de "vera socialismo". Se tiel, necesus klare difini la soci-politikan koncepton, por kiu oni batalu per Esperanto. Sed pri la celo de SAT ni ekscias malmulton konkretan, krom ke temu pri "nova soci-ordo sennacieca" aŭ eĉ nur "socio, en kiu oni parolos la lingvon de la Estonto". Komprenante rimedon kaj celon tiamaniere — per Esperanto al Esperantujo? — Bartelmes restas plene en la kadro de tradicia esperantismo.

Mendu ĉe UEA: 1,26 (por Nederlando 1,31) gld. plus sendokostoj 10%.

Intime kaj elstare

Recenzas Baldur Ragnarsson (Islando):

Ni devas vivi, de Kjell Walraamoen kaj Lina Gabrielli. La Laguna: J. Régulo, 1974. 154p. 19cm. Broŝ.

Du aŭtoroj: unu tutaĵo — certe unika fenomeno en nia literaturo en la aparta senco de *Ni devas vivi*, kie la amo estas la kunligilo, teme kaj reale. Pritrakti ĝian arton, intiman ĝis doloro en la animo propra, estas pli ol tasko delikata: oni sentas sin kvazaŭ paŝanta ŝtele inter kristaloj, sur sankta grundo. Homa dokumento

sur alta plano estas la poemciklo de la virino, plene sincera, tamen esprime disciplinita, tujrekone spontana, tamen plejofte tutkonscie celestima:

*Hodiaŭ, kiam
ni ame ludis
sur la planko,
mi diris al
ci:*

*"Kiel bele esti
bestoj!"
Bestoj ne
malicas,
bestoj ne
venĝas,
bestoj ne
faris
Auschwitz.*

Se la poemoj de Lina Gabrielli kompareblas kun simpla melodio kun belsurprizaj variantoj, la poemoj de Kjell Walraamoen similas al diversspeca programo, kies kerno ja estas sametosa, sed malpli egocentra: amo al la virino, la laboro, la naturo, la konkreta varieco de la vivo. Sian vidpovon li tamen preferas danki al sia inspirintino:

*Ŝi parolis pri Cassiopeia,
Andromeda, pri nebulo de Orion,
kaj ŝi malfermis la blindajn okulojn
antaŭ la kosmo –*

Kiel bela atesto pri la plivastiga potenco de sento, kiu laŭeme esprimeblas principe sendevie, kiel ja facile konstateblas en la poemoj de Lina Gabrielli.

Forme kaj arte ambaŭ poetoj elstaras. Frapaj komparaĵoj, originalaj bildoj, estas oftaj, precipe ĉe Walraamoen; ĉe li lertaj interplektoj de sferoj mallargaj kaj largaj estas aparte rimarkindaj; ĉe ambaŭ subtilaj sentoj trovas ripete tuŝkonkretan esprimadon. Ĉu mi ventfrapas asertante, ke tre eble Esperanto neniam tiel senpere servis por la esprimado de sentoj en nia literaturo kiel en ĉi tiu libro de geama duopo?

Mendu ĉe UEA: 8,70 (por Nederlando 9,05) gld. plus sendokostoj 10%.

alparolas nin intermite tra trivitaj monumentoj kaj palaj spuroj de runaj skribaĵoj. La merlo de la titolo kantas sur menhiro. La birdo estas simbolo de la procezoj de la vivo inter la lastaj postsignoj de misteraj socioj jam longe mortintaj:

*Vivo ne estas tempa;
nenio mortas krom muroj.*

Stranga karakterizo de la moderna Esperanto-literaturo estas la fakto, ke granda parto de ĝia plej bona verkaro venas el nordaj landoj. Pensu nur pri la Skota Skolo, kiu, sub gvido de William Auld (al kiu Goodheir dediĉas poemon), ekrolis antaŭ dudeko da jaroj, aŭ pri la poezio de la islandano Baldur Ragnarsson. Sed kvankam Goodheir multon ŝuldas al tiuj poetoj, lia plej granda ŝuldo rilatas la anglinon Marjorie Boulton. Estas taŭge, ke ŝi kontribuis al la volumo per antaŭparolo.

Goodheir malmulton novan aldonis al la establita tradicio. La akraj figuroj de liaj plej bonaj poemoj memorigas la leganton pri la japaneskaj formoj, kiuj fariĝis integra parto de la Esperanta stilo, kaj liaj lirikaĵoj efike ekspluatas la sintaksan flekseblecon de la lingvo. La poemoj, kiuj traktas la kunpuŝigon de valoroj inter la akirema homaro kaj la stranga sed puriga (kaj ĉiamdaŭra) mondo de la naturo, tamen konsistigas valoran kontribuon al la Esperanta tradicio.

La poemkolekto, kiu inkluzivas plurajn erojn jam aperintajn en gazetoj, estas produkto de amatora eldonejo kaj ĝi dolorige montras tiun fakton. La poezio de Goodheir alte superas la talentojn de la eldoninto.

Mendu ĉe UEA: Prezo anoncota.



Dekopo de Afke, La (1903) N. van Hichtum (1860-1939). El la nederlanda trad. T. Brinkman (1974). 92p. Ilus. 24cm. Broŝ. 9,- gld. Romano priskribanta la vivon de patrino Afke kaj ŝiaj dek infanoj, fine de la pasinta jarcento en frisa vilaĝo.

Esperanto limbă internațională (1974) Nicolae V. Bulancea. 182p. 24cm. Broŝ. 12,- gld. Ampleksa lernolibro en formo de analiza studo pri la Esperanta gramatiko. Aldonitaj vortaro kaj ekzercaro.

Insigno ronda kun broĉo, 2,2cm alta, kun oblikva verda stelo sur fona blukolora terglobo; ĉirkaŭe la vorto "Esperanto" per latinaj kaj cirilaj literoj. 0,96 gld.

Insigno triangula, pingla, 1,1cm alta. Verda stelo kun blanka fono sub la vorto "Esperanto" sur kolora fono; orumitaj randoj. 1,38 gld.

Systematikken i Esperanto, de Ib Schleicher. Kopenhago: Dana Esperanto-Asocio, 1974. 48p. 21cm. Broŝ. 5,16 gld. Komplete rearanĝita, pliampleksigita kaj modernigita *Ŝlosilo de Esperanto*, danlingva.


Ĉiujn mendojn adresu al: Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj k.c. 16% pro la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por la sendokostoj.

Valora kontribuo

Recenzas Humphrey R. Tonkin (Usono):

Merlo sur menhiro, de Albert Goodheir. Glasgow: Glasgova Esperanto-Societo, 1974. 14+58p. 20cm. Multobligita. Broŝ.

Albert Goodheir loĝas en Skotlando, kaj la skota kamparo malofte mankas en lia poezio. La morto de rozoj pro urba frosto memorigas lin, ke la genisto daŭre floras sur foraj montodeklivoj; cervoj malantaŭ parka krado rebildigas al li la vircervojn de nordaj arbaroj. Liaj verkoj plenplenas je la sonoj de la Nordo – la maro plaŭdanta ĉe la bordoj de solecaj insuloj, la mevoj, la alaŭdoj pepantaj super erikejoj. Kaj sub la greso troviĝas la postrestaĵoj de antikvaj popoloj, kiuj



La nova ponto inter Jutlando kaj Fueno estas simbolo de la moderna Fredericia; ĝi atingas la longecon de 1080 metroj.

Fredericia kaj la 31a IJK

LA 31a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO DE TEJO, 1975 07 19 – 07 26

Korespondadreso: Christian Lauridsen, Østergade 43, DK-7430 IKAST, Danlando.

JAM DELONGE, la invitoj por la Internacia Junulara Kongreso de TEJO, kiu okazos en Fredericia, Danlando, inter la 19a kaj la 26a de julio 1975, disiris al diversaj mondpartoj. Nun la programo de IJK konkretiĝas kaj la preparoj progresas, dum la aliĝoj alvenas el multaj landoj. Laŭ la ĝisnuna nombro de aliĝintoj, la organizantoj havas esperojn, ke IJK '75 estos multnombra kaj sukcesa aranĝo. Ŝajnas, ke jam

nun la nombro de la aliĝintoj superas tiun de la pasintjara IJK en Münster en la sama periodo. Plej multaj aliĝoj por Fredericia ĝis nun venis el Jugoslavio, FR Germanio, Bulgario, Hispanio, Hungario, Japanio, Belgio kaj — kompreneble — Danlando.

Maldekstre: La statuo de la Nekonata Soldato en Fredericia.

La urbo de IJK '75 estas Fredericia, kies centra situo estas tre oportuna rilate facilan alvenon de la partoprenantoj.

En unu senco Fredericia estas nova urbo, en alia — ĝi estas malnova. La urbo estas fondita per reĝa dekreto en la jaro 1650. Tiutempe la urbo funkciis kiel fortikaĵo de kiu oni povis kontroli la ĉefan transirejon inter Jutlando kaj la insulo Fueno. La fortikaĵon utiligis ne nur danaj soldatoj, sed foje ankaŭ malamikaj armeoj. Depost la jaro 1910 la fortikaĵo ne plu plenumas militan rolon. Anstataŭe ĝi nun servas kiel ŝatata promenloko — taŭga ankaŭ por nokta promeno — de la urbanoj.

Nun Fredericia estas moderna urbo kun 44 000 loĝantoj, elinter kiuj multaj vivas ekster la malnovaj remparoj. Tamen, pluraj trajtoj de la urbo ankoraŭ memorigas pri historiaj okazintaĵoj. Pro defendaj kaŭzoj, la preĝejoj de Fredericia ne havas turojn. Oni kutime renkontas tiajn preĝejojn nur en la plej malriĉaj partoj de Danlando. Multaj loĝantoj de Fredericia portas nomojn de judaj kaj francaj hugenotaj enmigrintoj, kiuj en la pasinteco ĝuis specialajn privilegiojn en la urbo. Tiuj enmigrintoj siatempe portis al Fredericia novajn ideojn, produktojn, labormetodojn,



plantojn, — kio havis grandan signifon ne nur por la urbo sed ankaŭ por la tuta lando.


Pli ol 200 ĉiutage alvenantaj trajnoj igas Fredericia la plej grava punkto de la danaj fervojoj. Ne estas strange, ke la urbo logis konsiderindan nombron da industriaj entreprenoj: fabrikoj de vitriolo kaj fosfata sterko, petrolrafinejo kaj multaj malpli grandaj uzinoj kaj entreprenoj. La granda, profundigita haveno funkcias kiel grava importa centro tra kiu venas petrolo kaj karbo. Ĉiujaraj foiroj kaj ekspozicioj kontribuas al la famo de Fredericia kiel komerca urbo.

Apud Fredericia situas du grandaj pontoj, kiuj ligas Jutlandon kun Fueno— super la Malgranda Belto. La malnova ponto servas precipe por la fervoja trafiko, dum la nova estas konstruita por aŭtomobiloj. Tiuj du pontoj kaj la grado ĝis kiu ili sukcesis enkomponi kun la naturo proponas aparte belan vidaĵon.


Inter la novaj konstruaĵoj de la urbo troviĝas ankaŭ "Fredericia-hallen", kiu dum IJK '75 servos kiel kongresejo, distrejo kaj amuzejo. Tute proksime (je nur kelkcent-metra distanco) troviĝas "Allé-skolen", kie dum la kongresa semajno loĝos la partoprenantoj. Se ni aldonas, ke la kongresanoj manĝos en la restoracio de "Fredericia-hallen", oni facile konstatas, ke ĉio troviĝas en unuloko kaj, ke estas tre neverŝajne, ke la kongresanoj spertos iajn organizajn knarojn.

Kia programo por Fredericia?

Konforme al la tradicio de la TEJO-kongresoj, ankaŭ en Fredericia oni laboros ĉefe en laborgrupoj. La ĉeftemo de la Kongreso estas "Kultura interŝanĝo". Oni planas tutan mozaikon de aranĝoj, kiuj prezentos kulturojn de la landoj el kiuj venos la partoprenantoj. Ĉiuj ĉi aranĝoj aparte emfazos la t.n. popolan kulturon, t.e. popoldancojn kaj kantojn. La organizantoj eĉ celas eldoni apartan kantlibreton, se kolektiĝos sufiĉe da materialo. Dum la kongresa semajno oni



Allé-skolen, kiu situas je kelkcento da metroj de la kongresejo, loĝigos ĉiujn partoprenantojn de la 31a IJK.



En la fiŝista haveno de Fredericia ĉiam estas io vidinda.

organizos instruhorojn dum kiuj eblos lerni dancojn kaj kantojn de diversaj popoloj. La gastiganto de la Kongreso, Dana Esperanto-Junularo, jam preparas vesperon de danaj kantoj, dancoj kaj muziko. Kompreneble, oni planas ankaŭ balon, ekskursojn, seminariojn kaj por la fino — komunan vojaĝon al Kopenhago, kie la 26an de julio komenciĝos la 60a Universala Kongreso, kies programo ankaŭ enhavas plurajn programerojn por la junularo.

Se vi ankoraŭ volas aliĝi. . .

Ankaŭ la kotizoj de la TEJO-kongreso altiĝis ekde la 1-a de aprilo 1975. Nun validas jenaj aliĝkotizoj:

Malpli ol 20-jaraj	300,- d.kr.
20—24-jaraj	325,- d.kr.
25—29-jaraj	350,- d.kr.
pli ol 30-jaraj	375,- d.kr.

Tio ĉi estas kotizoj, kiuj validas por la individuaj membroj de TEJO/UEA (minimume en la kategorioj de membroj-abonantoj). Nemembroj de TEJO/UEA pagas en ĉiu aliĝkategorio pliajn 25,- danajn kronojn. Kiel konate, la aliĝkotizoj kovras la kostojn de la tuta restado (kun ĉambro kaj manĝoj) dum la kongresa semajno en Fredericia. La kotizojn oni bv. sendi al: Poŝtĉekkonto 9 26 62 67, "TEJO-Kongreso 75", Thunøgade 26-4, DK-8000 Aarhus C. Oni povas pagi ankaŭ per poŝtmandato al la sama adreso. Bv. eviti pagojn pere de banko aŭ bankĉeko. Samtiel, bv. noti, ke la kotizoj denove altiĝos post la 30a de junio 1975.

Pli ol unu plia „bela ideo”

KIAM NI ANTAŬ UNU JARO skribis pri la Pasporta Servo de TEJO (v. nian revuon, marto 1974, p.56), pli-malpli temis pri klopodoj revivigi tiun interesan iniciaton de la junulara sekcio de UEA. S-ino Jeanne-Marie Liouville-Cash, la kasistino de TEJO, kiu nun gvidas la Servon, pasintjare sukcesis kolekti aliĝojn de 40 gastigantoj el 19 landoj. Ĝus aperis la ĉi-jara broŝuro de la Pasporta Servo *Gastigantoj 1975*, kiu enhavas precize 100 adresojn el 33 landoj. Evidente, almenaŭ la gvidanto de la Pasporta Servo de TEJO ne maldiligentis dum la pasinta jaro al kio plejparte necesas danki la subitan populariĝon de ĉi tiu interesa kaj verŝajne plurrilate unika junulara entrepreno en kaj ekster la Esperanto-movado.

En la moderne kaj lerte aranĝita broŝuro oni jam trovas informojn kiel aliĝi al la Pasporta Servo por la jaro 1976. La broŝuro notas, ke la planoj de la Pasporta Servo ne estis nur atingi la nombron de 100 gastigantoj, sed ankaŭ la nombron de 300 gastoj, tiuj, kiuj uzos la avantaĝojn de la Servo.

Iam antaŭe ŝajnis, ke ĉi tiu iniciato estas nur unu plia „bela ideo” malfacile realigebla. Nun oni frontas la realon, kiu estas pli bela ol tiu iama „bela ideo”. La Pasporta Servo de TEJO estas unu el tiuj malmultaj projektoj en la Esperanto-movado, kiuj ligas la plej ofte idealisman aktivecon en la Movado kun rekta persona utilo tiel por la gastoj kiel por la gastigantoj. Ĝi meritas ĉiuf flankan subtenon kaj malavaran apogon. Pliajn informojn petu ĉe: s-ino Jeanne-Marie Liouville-Cash, 72 rue de Rennes, F-75006 Paris, Francio.

HEJS

PRO ONIDIRA FREMDIĜO de *Kontakto*, kiu dum la lastaj jaroj malofte traktas movadajn temojn (kio cetere al multaj plaĉas), pro kunfandiĝaj problemoj de *TEJO-Novaĵoj* kaj *Koncize*, pro onidira reapero de *Kial ne?*, malfacile konstatebla, pro nuraj memoroj, kiuj postvivis la revuojn *Kvinpinto* kaj *Tamen*, estu pro kia ajn kaŭzo, sed — restas apenaŭ io plu por legi el la junularaj periodaĵoj en la Movado. Unu el tiuj raraj esceptoj lastatempe fariĝas *HEJS*, dumonata bulteno de la junulara sekcio de Hispana Esperanto-Federacio. La bulteno, kiun redaktas s-ro Miguel A. Altuna, estas modesta sed lerte produktata periodaĵo, kiu kun surpriza kompetento traktas aktualaĵojn el la vivo de la hispana junulara sekcio kaj el la Movado ĝenerale.

EN LA JUNULARA Esperanto-movado eble eĉ ne mankas iniciatoj kaj novaj ideoj, sed certe mankas tre ofte persista daŭrigado de malnovaj bonaj entreprenoj. Unu el la esceptoj tiurilate estas Somera Esperanto-Tendaro (SET) en Třebíč, Ĉeĥoslovakio, kiu ĉi-jare okazos la 23an fojon. SET 1975 proponos tendan aŭ kabanon tegmenton al du grupoj, kiuj restos tie dum po 2 semajnoj en julio kaj aŭgusto. La unua grupo ektendumos la 14an, kaj la dua la 28an de julio 1975. Dum ambaŭ periodoj okazos, krom la kutimaj tendaraj gajaĵoj, diversgradaj Esperanto-kursoj kaj eble ankaŭ specialaj seminarietoj. Aldonajn informojn bv. peti de: Esperanto-klubo, poŝtkesto 72, CS Třebíč.

Svisa migrado

EN ”BERNER OBERLAND” Svisa Esperanto-Junularo ankaŭ ĉi-jare organizas la t.n. „migradon en la svisa alparo”, kiu okazos inter la 4a kaj 9a de aŭgusto. La organizantoj (SEJ, Rue de la Cure 5, CH 2035 Corcelles, Svislando) jene reklamas sian aranĝon: ”Kun sia tuta havaĵo oni migras de unu loko al alia, trans montpasejojn, apud lagoj, en arbaroj, de unu kabano al alia, dum la plej bela aŭ spite al la plej malbela vetero.” La tuta aranĝo, ĉion inkluzive, kostas inter 160 kaj 220 sv.fr., depende de la aĝo de la partoprenantoj.

Bona informilo

GERMANA ESPERANTO-JUNULARO ĉiam aparte-nis al la plej aktivaj landaj sekcioj de TEJO. Ĝi estas unu el tiuj landaj junularaj sekcioj en la Movado, kiuj en la sino de sialanda ĝenerala Esperanto-organizaĵo sukcesis krei sian propran identecon kaj disvolvi propran aktivecon laŭ propra laborprogramo kaj ofte ankaŭ kun propraj financaj rimedoj. Por multaj siaj entreprenoj GEJ jam dum jaroj sukcesas ricevi ankaŭ financan subtenon el la ŝtata buĝeto. Ĉio ĉi aludas difinitan nivelon sur kiu aktivas Germana Esperanto-Junularo.

Bela ekzemplo de tiu novelo estas la ĵus aperinta informa broŝuro en la germana lingvo pri Esperanto ĝenerale kaj pri GEJ aparte. El 12 paĝoj de la broŝuro almenaŭ duonon okupas bildoj, trafe elektitaj kaj donantaj al la tuto ian leĝerecon kaj modernecon, kiuj ne estas la plej ofta karakterizaĵo de la informiloj pri la Internacia Lingvo kaj la Esperanto-movado. En la tre sukcesa informilo de GEJ neniu el la tekstoj okupas eĉ duonpaĝan spacon, ĉiuj estas malpli longaj. Kaj, kvankam la grafika aranĝo de la nova informilo povis esti iom pli aktuala, la broŝuro estas bona ekzemplo por vojo irenda kiam oni volas prezentiĝi al la ekstermovada publiko.



60a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, Kopenhago (Frederiksberg), 1975 07 26 – 08 02.

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

Adreso de la Loka Kongresa Komitato: Postboks 1503, DK-2700 Brønshøj, Danlando.

Favoraj kondiĉoj por mendoj kaj malmendoj

Por la UK en Kopenhago estas fiksitaj pli favoraj kondiĉoj por mendoj kaj malmendoj de loĝado, ekskursoj kaj bankedo. Kvankam – por administra faciligo – necesas fari kompletan antaŭpagon por loĝado, la Kongreso postulas nur malgrandan kompenso (5,- gld.) de tiuj, kiuj pro unu aŭ alia kaŭzo devas poste malmendi. Eĉ se vi devas lastmomente antaŭ la Kongreso malmendi la hotelon, oni garantias la redonon de la tuta sumo (minus 5,- gld.), kondiĉe, ke la malmendo okazos minimume du tagojn antaŭ la komenco de la loĝperiodo. Por la ekskursoj kaj por la bankedo la limdatoj por malmendo estas pli favoraj, ol en antaŭaj jaroj, kaj la prezoj restas sensanĝaj ankaŭ por malfruaj mendantoj (en antaŭaj jaroj ili altiĝis je 15% post difinita dato). Kompreneble, malfruaj mendantoj riskas trovi, ke ne plu restas liberaj lokoj.

Ankaŭ ISU kun nova vizaĝo

En la kadro de la klopodoj "eksperimenti kaj diversigi" rilate la programon de la UK, ankaŭ la sesio de la Internacia Somera Universitato ricevos ĉi-jare novan aspekton. Baldaŭ estos anoncita la kompleta (tre ampleksa) programo kun aparta akcento al difinitaj fakoj. Unuafoje la programon ellaboris, krom la sekretario de ISU (d-ro Jonathan Pool), internacia komisiono de universitataj profesoroj. Apud la regulaj lekcioj okazos serio da "seminarioj", t.e. instruhoroj por strikte limigita nombro da partoprenantoj kun faka interesiĝo, en kiuj la duono de la tempo estos dediĉita al diskutado.

Korekto de la listo de oficialaj perantoj

Tiuj, kiuj aliĝas aŭ mendas pere de la oficiala peranto por Nederlando, bv. noti, ke aperis erara informo en la Dua Bulteno (p.11). La ĝustaj adreso kaj konto-numero estas jenaj: Nederlanda Esperanto-Asocio LEEN, p/a Ruys de Perezlaan 2, Aerdenhout - 1541; poŝtekkonto 34563.

Alloga dana vespero en preparo

Laŭ la ĝisnunaj intertraktoj ŝajnas, ke la Dana Vespero en Kopenhago fariĝos unu el la plej variaj kaj altnivelaj de multaj jaroj. Malgraŭ la manko de folklora kulturo dana, kian posedas la plimulto de aliaj eŭropaj landoj, LKK celas prezenti al la monda publiko sintezon de diverskampaj kulturaj atingoj: modernan teatraĵon, gronlandajn bataalkantojn, monologojn, rakontojn de Andersen kaj la mondfaman pantomiman baladon de Tivoli.

Nova populareco de la dana literaturo

Okaze de la jubilea kongreso, la Libroservo de UEA notas kreskon de la interesiĝo pri danaj literaturaĵoj en la Internacia Lingvo. Precipe bone vendataj estas la impona *Dana antologio* kaj la diversaj eldonoj de *Fabeloj de Andersen* (eldonitaj de *Heroldo* kaj *Koko*).

Speciala kongresa poŝta stampo



La sveda grafikisto Franko Luin, kiu desegnis la emblemon de la 60a Universala Kongreso de Esperanto, preparis ankaŭ la specialan poŝtan stampon, kiun uzos la PTT-giĉeto dum la kongresa semajno. Sur ĉiuj poŝtaĵoj, kiujn oni

transdonos ĉe tiu giĉeto en la tagoj de la 26a de julio ĝis la 2a de aŭgusto, troviĝos la stampo, kiun vi vidas ĉi-supre.

Adreso por leteroj al kongresanoj

Dum la kongresa semajno funkcios por ĉiuj kongresaj poŝtaĵoj la adreso: 60a Universala Kongreso de Esperanto, Poste restante, Falkoner Centret, DK-2000 Kopenhago F. Se vi bezonas skribi al kongresano, bv. uzi tiun adreson kaj nepre aldoni sur la koverto tre klare la nomon kaj kongresan numeron de la ricevonto.

Dana numero de "Heroldo"

La gazeto *Heroldo de Esperanto*, laŭ sia multjara kutimo, dediĉis unu el siaj lastaj numeroj plejparte al la ĉi-jara kongreslando. La numero estas abunde ilustrita kaj enhavas multajn utilajn informojn por la estontaj kongresanoj.

Statistiko

Ĝis la fino de marto 1975, al la Kongreso aliĝis pli ol 850 personoj. (Detala statistiko aperos en la maja numero de la revuo).

Francio

- En Bulonjo-sur-Mar, kiu antaŭ 70 jaroj gastigis la Unuan Universalan Kongreson de Esperanto, la 3an kaj la 4an de majo 1975, okazos la tradicia Markola Kongreso de britaj, belgaj kaj francaj esperantistoj.

Finnlando

- Multjara membro de UEA, s-ro P. Riihivaara el Turku, antaŭ kelka tempo aperigis ampleksan broŝuron, kiu en la finna lingvo traktas antaŭjuĝojn kaj oponon, kiun tra la tempoj renkontadis novaj ideoj kaj gravaj sciencaj eltrovaĵoj. Apartan atenton la aŭtoro dediĉas al la lingva problemo kaj Esperanto kiel ĝia plej taŭga solvo. Oni konsideras la broŝuron unu el la plej bonaj finnlingvaj eldonaĵoj pri la Internacia Lingvo.

Pollando

- Vojevodia filio de Pola Esperanto-Asocio en Bydgoszcz havis dum la pasinta jaro 1 585 membrojn, kiuj agas en 30 rondoj de PEA. Por la jaro 1975 oni starigis konkurson "3x1000", kies celo estis varbi 1000 novajn membrojn de PEA, 1000 membrojn-subtenantojn kaj 1000 kursanojn. La 15an de marto oni anoncis, ke la celoj de la konkurso estas plenumitaj.

Italio

- Post la ĝemeliĝo de la itala urbo Triesto kaj la aŭstra Graz, ankaŭ la Esperanto-societoj de la du urboj komencis intense kunlabori kaj plani komunajn aranĝojn. Dum la printempo triestanoj iros al Graz, kaj en septembro, okaze de la 46a Itala Kongreso de Esperanto, aŭstroj venos al Triesto.

Aŭstrio

- Aŭstria Esperantista Federacio ligis ĉi-jare Semajnon de Internacia Amikeco kun la urbo de la 60a Universala Kongreso kaj aranĝis tre sukcesan programon kun la dana komunumo en la aŭstria ĉefurbo. Materialojn por la programo disponigis la LKK de la 60a UK en Kopenhago kaj la dana Ambasado en Vieno.

Kanado

- Al la urboj, kiuj dum kelkaj lastaj jaroj oficialigis la Semajnon de Internacia Amikeco, ĉi-jare aliĝis ankaŭ la urbo Victoria, B.C., kies urbestro, s-ro Peter A. Pollen, subskribis tiusencan dekreton la 19an de februaro 1975.

Jugoslavio

- La 19an de aprilo 1975, Esperanto-Societo en Sarajevo festos 25 jarojn de sia seninterrompa postmilita aktiveco kaj 65 jarojn de Esperanto en Sarajevo. Tiukaze, pli ol 20 membroj de la Societo ricevos valorajn librodonaĵojn.

Kolombio

- En Medellín, la ĉefa industria urbo de Kolombio, jam de kelka tempo okazas tre vigla aktiveco pri Esperanto (v. nian januaran numeron, p.2). Lastatempe, tre popularaj kaj sukcesaj tie fariĝis aranĝoj en la kadro de la serio "Esperantistaj vendredoj". Du tiaj aranĝoj, komence de marto ĉi-jare, traktis la temojn "Esperanta bibliografio" kaj "Bazaj aspektoj de la tradukado". La aranĝoj okazas en Universidad Pontificia Bolivariana, kaj ilin partoprenas studentoj kaj profesoroj de tiu universitato.

Belgio

- Fine de tiu ĉi monato (la 26an kaj la 27an de aprilo 1975), en Bruĝo okazos kombinita aranĝo de la 57a Kongreso de Belga Esperanto-Federacio kaj Unua Eŭropa Konferenco. La ĉeftemo de la aranĝo estos "La skolta movado kaj la Esperanto-asocioj en Eŭropo".

Rumanio

- Meze de marto 1975, en unu el la bukareŝtaj kulturdomoj, la tiea Literatura kaj Arta Klubo organizis apartan vesperon pri "Esperanto kaj literaturo". Antaŭ sesdeko da neesperantistoj, membroj de la klubo, la temon prezentis s-ro Ion Bunea-Bunescu. La aranĝon akompanis riĉa ekspozicio de Esperantaj libroj.

FR Germanio

- Dum sia estrarkunsido en Wuppertal, la 15an kaj la 16an de marto, Germana Esperanto-Asocio, interalie, traktis ankaŭ la lokojn kaj temojn de siaj kongresoj dum kelkaj sekvantaj jaroj. Post la ĉi-jara kongreso en Oberkirch (de la 17a ĝis la 20a de majo 1975), oni planas en 1976, kune kun la belga kaj nederlanda asocioj, kongresi en Eindhoven (Nederlando). En aŭtuno samjare, GEA volas aranĝi konferencon pri la lingva problemo. La konferenco okazos en Bonn kaj celas partoprenigi politikistojn de ĉiuj partioj en la germana Parlamento. En la jaro 1977, GEA kongresos en Paderborn, kie samtempe devus okazi konferenco pri Esperanto kaj informatiko.

Soveta Unio

- Rostova Esperanto-klubo "Amikeco" organizis aparte sukcesan aranĝon okaze de la ĉi-jara Semajno de Internacia Amikeco. La klubo gastigis pli ol 100 gejunulojn, kaj la programon partoprenis (v. la foton) ankaŭ gastoj el Ĉilio, Kostariko kaj Panamo.




Semajno de Internacia Amikeco en la soveta urbo Rostov: Gastoj el malproksimaj landoj partoprenis en la programo.

Lernolibroj

- *Esperanto programita*, la konata lernilo de Hermann Behrmann, kiu el sia originala versio por germanlingvanoj jam estas tradukita kaj adaptita ankaŭ por la parolantoj de pluraj aliaj lingvoj, ĵus eldoniĝis ankaŭ en la itala lingvo. La eldoninto estas Itala Esperanto-Federacio (Via Villoresi 38, I-20143 Milano).

Foiroj

- Jam la 17an jaron sinsekve, la Internacia Foiro de Barcelono, kiu ĉi-jare okazos inter la 3a kaj la 12a de junio, eldonis sian afiŝon ankaŭ en la Internacia Lingvo (v. la foton).



Kiel kutime dum la lastaj 9 jaroj, Hispana Esperanto-Instituto havos informan standon dum la Foiro. Ankaŭ la Specimena Foiro de Milano, kiel antaŭe, plue eldonis Esperantan afiŝon pri sia ĉefaranĝo en 1975 (inter la 12a kaj la 24a de aprilo). Itala Esperanto-Federacio havos sian informojn en la Foiro. IEF havos standon ankaŭ en la Internacia Specimena Foiro de Triesto (de la 17a ĝis la 29a de junio 1975).

Seminarioj

- Distrikta komitato de Bulgara Esperantista Asocio (Bul. Ĥristo Botev 97, Sofia 3), inter la 5a kaj la 24a de aŭgusto organizas du paralelajn pedagogiajn aranĝojn en Burgas, ĉe la Nigra Maro. Temas pri plurgra-

daj kursoj por instruistoj kaj pri pedagogia seminario. Ambaŭ aranĝoj celas internacian instruistaron kaj okazas sub la aŭspicioj de ILEI. La limdato por la aliĝoj estas la 31a de majo 1975.

- En la konata esperantista kampadejo Primošten, ĉe la Adria Maro en Jugoslavio, ankaŭ ĉi-jare (de la 7a ĝis la 24a de julio) okazos la tradicia Pedagogia Esperanto-Seminario de Kroatia Esperanto-Ligo (Poŝtfako 703, YU-41001 Zagreb).

Lepruloj

- Lernantoj de Johannes-Gimnazio en Lahnstein, FR Germanio, kiuj dum kelkaj lastaj jaroj partoprenas humanan aktivecon por helpi al la lepruloj en la Tria Mondo kaj por siaj kontaktoj uzas ankaŭ Esperanton, dum la pasinta jaro sukcesis kolekti 60 000 germanajn markojn tiucele. Dank' al la aktiveco de la tiea gimnazia instruisto, membro de UEA, d-ro J. Kondor, antaŭ nelonge eldoniĝis tre bela glumarko kun teksto en la germana kaj Esperanto. Folio kun 32 glumarkoj kostas 2,- germanajn markojn (Alte Schloss Str. 25, D-545 Neuwied 21-Engers).

Eldonaĵoj

- La represo de la tuta kolekto de ĉiuj tri periodoj de *Literatura Mondo*, prizorgata de aparta koooperativo tiucele fondita en Tokio (v. artikolon en la julia/aŭgusta numero 1974, p.126 kaj anoncon en la numero de septembro 1974), enhavos detalan indekson, kiun prizorgis s-ino Maria Benczik, profesia bibliografiisto el Budapeŝto. La indekso aperos en la sesa (kaj lasta) volumo de la represata kolekto, kies apero estas anoncita por la fino de tiu ĉi jaro.

Prelegvojaĝoj

- S-ro Justin Minani, burundiano, kiu studas en Liono (Francio), denove (v. nian revuon, aprilo 1973, p.70) faris prelegvojaĝon en Svedio, organizitan fare de INTER — Agadgrupo por Esperanto, Gotenburgo. Ankaŭ dum la ĉi-foja prelegvojaĝo, okazinta meze de marto, s-ro Minani parolis pri sia patrolando Burundio. La prelegoj okazis en Esperanto kun svedlingva traduko. La preleginto havis ankaŭ plurajn intervjuojn por la svedaj gazetararo, radio kaj televido.

Interlingvistiko

- Kiel dum kelkaj antaŭaj jaroj, ankaŭ ĉi-jare, inter la 1-a kaj la 4a de majo 1975, Scienca Interlingvistika Rondo de Varsoviaj Studentoj organizas Studentan Interlingvistikan Seminarion en la pola ĉefurbo. Ĉi-foje la Seminario okupiĝos ne nur pri Esperanto sed ankaŭ pri kelkaj aliaj planlingvoj.

Persone

Fuller

- Kvankam nia revuo malofte kaj nur en esceptaj kazoj notas personajn jubileojn, en la kazo de s-ino D. B. Fuller (6489 Long Island Drive, N.W., Atlanta, Ga. 30328, Usono) valoras fari escepton: La 16an de februaro ĉi-jare, s-ino Fuller fariĝis centjara! Ŝi konatiĝis kun Esperanto en 1905 kaj jubileas ankaŭ pro tio.

Pool

- La aganta direktoro de CED, prof. d-ro Jonathan Pool el Usono, kiu lastatempe postenas en la Universitato McGill en Montrealo (Kanado), dum aprilo ĉi-jare faras viziton al Soveta Unio. Tie li, en la urboj Moskvo, Baku kaj Aŝhabad, renkontiĝos kun sciencistoj laborantaj en la fako socilingvistiko. La vizito okazas en la kadro de interŝanĝoj inter la sciencaj akademioj de Soveta Unio kaj Usono.

Skotte

- F-ino Janet Skotte, kiu vivas en la ĉefurbo de Peruo, lastatempe plurfoje aperis en la tiea televido por paroli pri la Internacia Lingvo. Ŝi ofte gastas ankaŭ sur la paĝoj de la loka gazetararo. Momente f-ino Skotte gvidas kvar Esperanto-kursojn en la perua ĉefurbo Limo.

Tholet

- La urba konsilanto, s-ro Clément Tholet, proponis, ke la nomo "Esperanto" estu donita al grava ponto super Mozo kaj Alberto-kanalo en la belga urbo Herstal. La urbaj aŭtoritatoj unuanime akceptis la proponon kaj interkonsentis, ke la inaŭgura ceremonio okazu en septembro ĉi-jare, kiam oni verŝajne organizos tie ankaŭ internacian renkontiĝon.

Ĉiujn informojn pri radio bv. sendi al s-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, F-75016 Paris, Francio, En la tabelo, la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa Tempo oni aldonu unu horon. Aliajn horsistemojn v. en la Jarlibro 1973, Dua Parto, p.157. Mallongigoj: I = informoj, P = parolado, K = kurso.

Ĉiutage

05.00-05.30 Varsovio, 200m (1502 kHz), 50.04m (5995 kHz), 48.90m (6135 kHz), 41.27m (7270 kHz). I. P. Pola Radio, Esperanto-Redakcio, Poŝtkesto 46, PL-00950 Warszawa, Pollando.
15.30-16.00 Varsovio, 41.99m (7145 kHz), 31.45m (9540 kHz), 31.01m (9675 kHz). I. P.
21.30-22.00 Varsovio, 200m (1502 kHz), 50.04m (5995 kHz), 48.90m (6135 kHz). I. P.

Dimanĉe

05.45-05.55 Vieno, 48.74m (6155 kHz), 41.64m (7205 kHz), 16.85m (17800 kHz). I. P. ORF Esperanto, P.O.B. 700, A-1041 Wien, Aŭstrio. Ripeto de la antaŭa sabata programo.
08.30-08.55 Sofio, 49.42m (6070 kHz). P. Radio Sofia, Bulgario.
10.30-11.00 Muritiba, 190m (1580 kHz). I. K. Soc. Em. Radiovox, Muritiba (Bahia), Brazilo.
11.00-11.30 Pekino, 47m, 40m, 30m. I. Radio Pekino, Esperanto-Fako, Pekino, Pop.Resp.Ĉinio.
12.30-13.00 Pekino, 30m, 25m, 19m. I.
20.00-20.20 Romo, 49.92m (6010 kHz), 41.24m (7275 kHz), 41.15m (7290 kHz). P. Radio Roma, Esperanto-Fako, Casella Postale 320, I-00100 Roma, Ital.
20.05-20.30 Sofio, 5061m (5928 kHz). P.

Lunde

00.00-01.00 Sorocaba, 278m (1080 kHz). Rádio Clube de Sorocaba, rua São Bento 190, BR-18100 Sorocaba, S.P., Brazilo.
12.20-12.30 Berno, 75.28m (3985 kHz), 48.66m (6165 kHz), 31.46m (9535 kHz), 19.60m (15305 kHz), 19.44m (15430 kHz), 16.86m (17795 kHz), 13.94m (21520 kHz). P. (d-ro A.

Baur). Svisa Kurtonda Radio, Esperanto-Fako, CH-3000 Bern 15, Svislando.

Marde

12.10-12.20 Gdańsk, 66.29 MHz (mod. frekv.). Ripeto, dek tagojn poste, de la sabata programo el Varsovio, unu fojon monate.
16.40-16.55 Bratislavo, 68.84 MHz, (mod. frekv.) kaj aliaj stacioj 67.94 MHz, 69.20 MHz, 69.50 MHz, 69.68 MHz. K. Radio Bratislava, Leninplaco 13a, Bratislava 1, Ĉeĥoslovakio.
17.35-17.45 Vieno, 203m (1475 kHz). P. (Ĉiun kvaran sinsekvan mardon: la 1-an de aprilo, la 29-an de aprilo ktp.).

Merkrede

12.20-12.30 Berno, kiel lunde (s-ro Gacond).
20.45-21.00 Sabadell, 203m (1475 kHz), 89.1 MHz (mod. frekv.). I. K. Radio EAJ 20, Sabadell, Hispanio.

Ĵaŭde

16.25-16.40 Bratislavo, kiel marde.
21.45-21.55 Berno, 75.28m (3985 kHz), 48.66m (6165 kHz), 31.46m (9535 kHz), 25.60m (11720 kHz), 25.27m (11870 kHz), 19.60m (15305 kHz), 19.44m (15430 kHz). P. (d-ro A. Baur).

Vendrede

20.00-20.30 Pekino, 43m, 33m, 31m, 25m. I.
23.05-23.20 Zagrebo, 264m (1163 kHz). P. Radio Zagreb, Esperanto-Fako, Jugoslavio.

Sabate

00.10-00.20 Varsovio, 1321m (227 kHz). P. Programo preparita de Pola Radio, ul. Uphagena 1, Gdańsk-Wrzeszcz, Pollando; ĝi okazas unu fojon ĉiumonate dum muzika programo.
11.00-11.30 Pekino, kiel dimanĉe.
12.30-13.00 Pekino, kiel dimanĉe.

16.45-16.55 Vieno, 48.74m (6155 kHz), 16.87m (17780 kHz). I.P.
20.00-20.30 Pekino, kiel vendrede.
21.45-21.55 Berno, kiel ĵaŭde (s-ro Gacond).
22.00-22.15 Valencio, 358m (836 kHz). P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanio.

RADIO VARSOVIO, krom la ĉi-supre anoncita ĉiutaga programo, prezentas "Anguleton por esperantistoj": 1) dum la germanlingvaj programoj dimanĉe de la 21.00 ĝis la 21.30 per ondoj 49.22m (6095 kHz), 48.74m (6155 kHz), 42.11m (7125 kHz), 41.18m (7285 kHz); 2) dum la svedlingva programo marde de la 15.00 ĝis la 15.30 per ondoj 50.04m (5995 kHz), 48.90m (6135 kHz); 3) dum la danlingva programo dimanĉe de la 20.00 ĝis la 20.30 per ondoj 49.22m (6095 kHz), 42.11m (7125 kHz).

ĜENERALA AŬDEBLECO

a) Stacioj nur loke aŭdeblaj (nur en la lando mem, kelkaj nur en la urboj): Bratislavo (tamen aŭdebla en la apudaj landlimaj regionoj), Gdańsk (mod. frekv.), Muritiba, Sabadell.

b) Stacioj aŭdeblaj en Eŭropo kaj mediteraneaj landoj: Berno (75.28 m, 48.66m, 31.46m), Pekino (vesperaj elsendoj vendrede kaj sabate), Romo, Sofio, Valencio (en la suda Eŭropo), Varsovio, Vieno (203m, 48.74m), Zagrebo.

Stacioj aŭdeblaj en Azio kaj Ameriko: Pekino (dimanĉe kaj sabate je la 11.00 kaj 12.30 GMT), Sorocaba (en Brazilo kaj najbaraj landoj), Vieno (41.64m, 16.85m en la sud-orienta Azio).

ĉ) Stacio aŭdebla en Afriko kaj la orienta parto de Nord-Ameriko: Berno (25.60m, 25.27m, 19.60m, 19.44m, 16.86m, 13.94m).

Tio ĉi estas nur ĝenerala skizo pri la aŭdebleco, kiu dependas ankaŭ de la modelo de la ricevilo, de la atmosferaj kondiĉoj kaj aliaj lokaj cirkonstancoj diversspecaj.

N-ro 488, 1975-02-28

SOCIETO ZAMENHOF 1975

US: 41 R.R. Neri. ITAL: 42 R. Sgroi. BRAZ: 43 J. Dias Pinto. US: 44 W.H. Schulze, 45 C.L. Schulze. FRANC: 46 H. Dabezies, 47 J.P. Beau. FRG: 48 B. Vogelmann. SVISL: 49 O. Walder. HISP: 50 A. Enriques de Salamanca. BRAZ: 51 F. de Souza Almada, 52 M. Pozder Almada.

NOVAJ DELEGITOJ

Konforme al la artikolo 11 de la Ĝenerala Regularo de UEA ni publikigas ĉi-sube la nomojn de nove nomitaj delegitoj de UEA. Se ĝis la dato 1975-06-15 neniu membro pro grava kaŭzo protestos, la nomigo fariĝos valida.

BELG: Marie-France de Wind-Bauwens, D, FD Bruxelles; Serge Denoël, D Liège. BRIT: Marion Walker, D Bridlington. FINN: Vilho Penttilä, FD Kirkkonummi. FRANC: André Gimbert, FD Brive-la-Gaillarde; Raymonde Perault, FD Draveil; Jean Chapellier, D, FD Moulins-les-Metz; Gaston Turin, FD Pontarlier; Alfred Tailpied, FD Trouville-sur-Mer. FRG: Karl Dzida, D Fürstenfeldbruck; Heinrich Köhne, D Göttingen; Willi Berger, FD Kitzingen. HUNG: Anikó Cziboly, FD Budapest; Károly Nagy, FD Budapest; Helena Juhász, D Hodmezövásárhely. NED: Cornelis Nelson, D Schoonoord. SVED: Ingrid Näsholm, VD, FD Sundsvall. SVISL: Tazio Carlevaro, D, FD Les Hauts-Geneveys. US: Elliot J. Zais, D Bellaire.

NE PLU VALIDAS

(pro adresŝanĝoj aŭ aliaj kaŭzoj) la informoj pri la jenaj delegitoj en la Jarlibro 1975:

AŬSTRAL: Rockhampton, VD. BELG: Leuven, FD (pentroarto kaj zaira arto); Liège, D. BULG: Plovdiv, FD (kooperativismo); Sofia, FD (komerco). DANL: Fredericia, VD. FINN: Turku, VD (Karttunen). FRANC: Jarville; Nancy, FD (fervojoj); Nantes, VD; Pont-de-Beauvoisin. FRG: Hannover, D kaj FD (edukado); Heidelberg, FD (muziko); Schloss-Holte. HISP: Reus. ITAL: Verbania Intra, FD

(turismo). JUG: Stružje. POLL: Kraków, VD kaj FD (literaturo); Warszawa, FD (elektrotekniko).

DONACOJ 1975 (Gld.)

ASOCIA KAPITALO: Kanado: Dorothy M. Henderson 2389,50. Sumo ĝisnuna 2389,50.

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Belgio: Germain Pirlot 10,64. Britio: Misa-ko Aihara 15,-. FR Germanio: Germana Esperanto-Asocio (subvencio por la Tria Mondo) 518,11. Sumo ĝisnuna 543,75.

FONDAĴO CANUTO: Belgio: Bl. Geers 34,10. Britio: W.G. Atkinson 41,60; ges-roj A. Venture 30,-. Finnlando: N. Kavenius 66,50,-. Francio: Yvette Vierne 50,-. FR Germanio: Franz Liebl 50,-; Adolf Mosch 10,32; Memore al H. Wilke 51,79. Nederlando: E.S. Otto 10,-; Akiko Woessink-Nagata 62,35. Svedio: Erik Brenander 48,45; Lief Holmlund 100,-; Amy Nilsson 60,61; Klara Waldén 96,89. Svislando: W. Perrenoud-Theis 100,-. Sumo ĝisnuna 812,61.

POR LA AGADO DE CED: Britio: W. Laurie 17,09. FR Germanio: Franz Liebl 12,10. Sumo ĝisnuna 29,19.

POR ENCIKLOPEDIO DE ESPERANTO: Japanio: Tacuo Huĝimoto (valoro de libroj) 148,50. Sumo ĝisnuna 148,50.

ĜENERALA KASO: Anonime 35,-. Belgio: Stella de Weerd 18,50. Britio: H.J. Kirk 5,-. Danlando: P.V. Bagger 6,-. Finnlando: A. Linje 4,90; ges-roj Tähkävuori 5,71. FR Germanio: H. Franck 10,36; Gisela Jungkamp 64,79; H. Rausch 10,37; Elsa Rosenfeld 5,19; Klaus Schlüter 20,70. Japanio: Katsuhiko Ueno 19,-. Luksemburgo: Albert E. Lambert 5,-. Nederlando: N.L. Daams 10,-; F.H. Kat 30,-. Nov-Zelando: D.J. Langman 12,24; M. McNamara 170,-. Svedio: Gunnar Börgesson 16,35; Karl Gustafsson 42,39. Svislando: Franz Bierhoff 42,75. Sumo ĝisnuna 534,25.

PATRONAJ MEMBROJ DE TEJO 1975: 8 A. Righi, Italio. 9 H. Behrmann, FR Germanio. 10 J. Muller; 11 H.M. Schipper, Nederlando. 12 J. Azcuénaga Vierna, Hispanio. 13 Renée Triolle; 14 J. Barré, Francio. 15 Harri Laine, Finnlando. 16 A. Colombin; 17 Carlo Minnaja; 18 Michela Lipari, Italio. 19 L. Anjer, Norvegio. 20 D.J. Langman, Nov-Zelando.

PROPAGANDA KONTO: 30a IJK de TEJO 15,56. Sumo ĝisnuna 15,56.

FONDAĴO TEJO: Eŭropa Junulara Fondaĵo 1923, 53. Finnlando: N. Kavenius 35,-. Sumo ĝisnuna 1958,53.

TIO ĈI ESTAS NUR LA DONACOJ ATINGINTAJ LA CENTRAN OFICEJON ĜIS LA FINO DE FEBRUARO. TIUJ, KIUJ ALVENIS DUM MARTO APEROS EN LA MAJA NUMERO DE LA REVUO. AL ĈIUJ TRE KORAN DANKON!

Bindilo aŭ Jarkolekto

ION ONI DEVAS FARI! NE EBLAS SIMPLE TIEL LASI LOZAJN EKZEMPLEROJN DE LA REVUO TRENIĜI TRA LA ĈAMBROJ KAJ JAROJ!

Bela kaj fortika bindilo por teni en bona ordo la 11 ĉi-jarajn numerojn de nia revuo kostas 9,- (por Nederlando 10,44) guldenojn plus sendokostoj 10%.

Bele bindita JARKOLEKTO 1974 estas havebla por 14,- (por Nederl. 14,56) gld. plus sendokostoj 10%. Haveblaj ankoraŭ la jarkolektoj de 1966, 1968, 1969, 1972, 1973 kontraŭ la sama prezo.

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,60 gld. (1 internacia respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj respondecas nur la anoncantoj.

POSTKONGRESO 1975! Unika aranĝo inter oficiale ĝemelaj urboj — AARHUS, Danlando, de la 3a ĝis la 6a de aŭgusto, kaj GOTENBURGO, Svedio, de la 6a ĝis la 9a de aŭgusto. Petu informojn kaj turismajn prospektojn de la respektivaj adresoj: Postkongreso, Hørmarksalle 5, DK-8240 RISSKOV-Aarhus, Danlando / Postkongreso, Box 55028, S-400 53 GOTENBURGO, Svedio.

Helpemaj esperantistoj estas invitataj eltrovi ĉu ekzistas propralanda listo de asocioj por suferantoj diversmalsanaj. Ken Hadler, "Croft House", The Croft, Hastings, Sussex, Anglujo.

LA TORNISTRO (bona distro) n-roj 1, 2 kaj 3. Varia enhavo ilustrita: artikoloj, poemoj, spritaĵoj, recenzoj, rakontoj, kotopo. 52p. 22cm. Prezo: po 5 gld. Mendu ĉe UEA; aŭ kontraŭ po 10 internaciaj respondkuponoj aŭ egalvaloro, ĉe Argentina Esperanto-Instituto, C.C. 58, Suc. 12, Buenos Aires, Argentino.

La 2a Kongreso de RH okazos de la 25a ĝis la 27a de julio 1975 en Kioto. Vin invitas Rondo Harmonia, 606 Kiotoŝi Sakjojubinkjoku Ŝiŝo-bako 37, Japanio.

Esperantistoj de la mondo! Meksika ĵurnalisto skribis, ke Esperanto estas jam forgesita afero. Skribu al li afable, mallonge, por konvinki lin, ke Esperanto vivas kaj progresas. Lia adreso: Daniel Mir, Hidalgo Poniente 2015-4, Monterrey, Meksikio.

La urba vojaĝagentejo proprainiciate eldonis novan broŝuron pri la urbo Kuopio. Nepre petu ĝin tuj senpage al: Kuopion Kaupungin Matkailutoimisto. Haapaniemenk. 17, SF-70100 Kuopio 10, Finnlando.

Vojaĝonte al Ĉeĥoslovakio, Greklando aŭ Jugoslavio, skribu jam sufiĉe frue al la Centra Oficejo de UEA por peti specialan cirkuleron kun utilaj informoj. Adreso: UEA, Nwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002.

Salutu nian urban feston 31/majo - 7/junio. Faru propagandon! Wolverhampton Fiesta, 11 Church Walk, Penn Fields, Wolverhampton, Anglujo. Respondo garantiata.


Fraŭlo 26-jara, hungara, metiisto, deziras korespondi edziĝcele kun serioza samideanino, loĝanta en Eŭropo. János Gaál, H-8946 Pusztaederics, Hungario.



En unu volumo — ĉio sciinda pri la lingvo kaj Movado

En mondo de nestabilaj valoroj, kie kvalito estas oferata al kvanto, maloftaj estas la aĉetaĵoj, kies valoro kreskas de jaro al jaro kaj kies apero videble ŝuldiĝas al grandega homa fortostreĉo. Sed tia estas la verko "Esperanto en Perspektivo": monumenta kompendio de la Esperantaj movado kaj kulturo tra 87-jara ekzistado — kaj, perspektive, en la estontecon. Sur ĝiaj 876 paĝoj troviĝas praktike ĉiuj scioj, kiujn povas bezoni la uzanto de la Internacia Lingvo, inkluzive de multaj faktoj neniam antaŭe publikigitaj.

Verkis Ivo Lapenna (ĉefred.), Ulrich Lins (red.) kaj Tazio Carlevaro. Eldonis UEA (Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo). 876p. 20,5 x 14 cm. 65 ilustropaĝoj. 40 indeksopaĝoj. Prezo: 84,— gld. (por Nederlando 87,36 gld.) plus sendokostoj 10%. Ĉe la Libroservo de UEA.



Nuntempe la Hungara Silkindustria Entrepreno encirkuligas siajn produktojn kaj enlande kaj eksterlande uzante fabrikmarkon DUNASILK.

7200 laboristoj de 7 teksfabrikoj, unu apreta fabriko kaj unu fabriko por pliampleksigo de fadenoj produktas en valoro de ĉ. 2,5 miliardoj da forintoj dum unu jaro. La Entrepreno estas registrita kiel la tria teksindustria entrepreno de Hungario.

La sortimento de la fabrikitaj produktoj entenas ĉiujn produktojn de tia industrio. Oni prilaboras en fabrikoj de la Entrepreno krom rajonaj fadenoj, diversaj sintezaj fibroj, unuavice poliamidajn kaj poliesterajn silkojn, plue la plej modernajn triacetatajn kaj tricelonajn fadenojn, fadenojn fortigitajn per filamentoj, torditajn t.n. efektajn fadenojn kaj — kontentigante la dezirojn de la modernaj vestomodoj — oni prilaboras ankaŭ miksitajn fadenojn el poliesteroj kaj kotonoj.

DUNASILK — Hungara Silkindustria Entrepreno produktas el tiuj fadenoj kaj virinajn kaj virajn, bone sortimentitajn subŝtofajn teksaĵojn, pece farbitajn kaj bunte teksitajn virinajn robŝtofojn. Oni produktas ankaŭ sintezajn varojn, uzeblajn por pluvmanteloj kaj sportaj vestaĵoj aŭ per hidrofobila aŭ per speciala t.n. netalona apreto. Por sportaj vestaĵoj plej idealajn ŝtofojn rezultigas la lasta metodo.

Inter la plej novaj produktoj oni devas mencii virajn kaj virinajn vestaĵojn por kies produktado oni jam uzas grandmezure poliesterajn fadenojn.

grandmezure poliesterajn kaj miksitajn fadenojn, kiuj enhavas ankaŭ poliesterajn fadenojn.

Apartan vendan terenon okupas grupo de dekoraj materialoj. Nuntempe ni jam produktas po kelkmilionoj da metroj jare da dekoraj materialoj de kvalitoj ĵakarda kaj alispeca.

Tiujn ĉi materialojn niaj aĉetintoj uzas parte por kurtenoj, parte por mebloŝirmaj ŝtofoj kaj meblotegaĵoj, ĉar la modeloj kaj koloroj de niaj varoj estas vere plaĉaspektaj, modernaj kaj tiuj varspecimenoj bone ornamas loĝejojn.

Pri la jam menciitaj pliampleksigitaj fadenoj ni devas emfazi, ke DUNASILK — Hungara Silkindustria Entrepreno mem produktas ilin en sia fabriko por pliampleksigo de fadenoj, dum unu jaro ĉ. 3000 tunojn, en la plej diversaj sortimentoj kaj kvalitoj, uzante ĉe la pliampleksigo fadenojn konsistantajn el poliamida-6, poliamida-66 kaj poliesteraj silkoj.

Pri tiuj ĉi pliampleksigitaj poliamidaj kaj poliesteraj silkoj, pro riĉa kolora sortimento de iliaj fadenoj, ni jam vere povas aserti: ĉiuspecajn dezirojn ni povas kontentigi.

Speciala divizio de nia entrepreno okupiĝas pri teknikaj ŝtofoj. Ni devas aparte mencii la ordinarajn vitroteksaĵojn kaj vitroteksaĵojn kun neorta fadenaro (roving). Ankaŭ por tiuj ĉi produktoj ni havas jaran kapaciton de ĉ. 300 specoj de artikloj

Kiel videblas ankaŭ el la supraj informoj DUNASILK — Hungara Silkindustria Entrepreno povas liveri kontentigan sortimenton el ĉiaspeca pretendebila produkto silkindustria. Ĝi konstante okupiĝas pri fabrikado de ĉ. 300 specoj de artikloj.


La esploroj kaj laboroj por plibonigi la kvalitojn de la produktoj en nia entrepreno neniam ĉesas. Ni duonjare encirkuligas nian novan — ĉiam pli riĉan — sortimenton, kiu enhavas ŝtofojn plej modernajn kaj novajn modelojn kun novaj koloroj laŭ la plej lasta modo.

Same altnivelas la zorgado pri plibonigo de fabrika teknologio kaj gardado de bona kvalito de la produktoj.

La modernaj produktiloj de la entrepreno, la faksperta zorgema laboro, la bona organizado kaj la dumfabrikada multfoja kontrolo de la kvalito garantias, ke niaj aĉetantoj estos ĉiam kontentaj pri la liveritaj produktaĵoj.

MAGYAR SELYEMIPAR VÁLLALAT
HUNGARA SILKINDUSTRIA ENTREPRENO
1251 BUDAPEST P.O.B. 6

**Perfekta desinfektado de ĉambro-aero!
Bona profilakto kontraŭ insektoj!**



Ĉi tiu aparato vaporigas Evola-T, aerdesinfektan likvan rimedon. Nur 1 gramo hore sufiĉas por absolute desinfecti spacon de 100 kubaj metroj. Kun elektra lampo de 15 vattoj ĝi sufiĉas por 300 kubaj metroj, ekz. klasoĉambro; kun lampo de 25 vattoj ĝi sufiĉas por spaco ĝis 800 kubaj metroj. Infektoj de gripo, kataro kaj ĉiuj infek-

taj malsanoj estas malebligataj. Rekomendinda por ĉiuj ĉambroj kaj salonoj kun publika trafiko: lernejoj, hejmoj, atendejoj, oficejoj, laborejoj, fabrikoj, hospitaloj; efika ankaŭ en fungokeloj, panfabrikoj, kontraŭ putrobakterioj kaj ŝimo. Kontrolita de la universitatoj en Munkeno kaj Kopenhago. Vendopermeso de la Ministerio por la sano en FR Germanio kaj en multaj aliaj landoj.

**Chemische Fabrik Bruno Vogelmann
D-718 Crailsheim**

SE VI VERE NE SCIAS

**kion donaci ĉi-jare,
pensu pri Donaca Karto
de la Libroservo de UEA.**

Vi pagas 5 guldenojn (aŭ egalvaloron), plus la sendokostoj 10%, kaj ricevas specialan karton, kiun vi plusendas — kun viaj varmaj bondeziroj, kompreneble —


al tiu problema persono.

Ŝi (aŭ li) povos tiam aĉeti laŭ propra elekto iun ajn libron aŭ diskon aŭ abonon ĉe la

LIBROSERVO DE U.E.A.




TUTMONDAJ INFANOJ (6 ĝis 14 jaroj)! La Urbestraro kaj Centro de Esperanto, Santa Colona de Gramanet invitas partopreni la 3an Int. Ekspozicion-Konkurson de pentraĵoj pri libera temo (akvareloj, minimume 25x25cm), limdato — la 31a de julio 1975. Sendu al: C.E.Puiscastellar, Esperanto, Avda Ansalmo 79, Santa Colona de Gramanet (Barcelona), Hispanio. Informoj ĉe la sama adreso.



A 5 irpk



B 5 irpk



C 10 irpk

A + C = 11 irpk
B + C = 13 irpk
B + C + 5 ekzempleroj de A . . = 15 irpk
10 ekzempleroj de A = 20 irpk
10 ekzempleroj de B = 30 irpk
10 ekzempleroj de C = 80 irpk

Mendeblaj ĉe

**D-ro Nassif Isaac
16, School Road
Crynant - Neath,
Glam. - S. Wales
Britujo.**

N.B. Mendojn en la valoro de pli ol 15 irpk oni pagu per ĉeko.